

1994: La familio de Dio: alvokata esti unu, kore kaj mense (Ago 4,23-37) (Materialo el Irlando - prepara kunsido en Dublino, Respubliko de Irlando)

1995: Koinonia: komuneco en Dio kaj unu kun la alia (Joh 15,1-17) (Materialo el Fido kaj Konstucio, prepara kunsido en Bristol, Anglio)

1996: Jen mi staras ĉe la pordo kaj frapas (Apo 3,14-22) (Prepara materialo el Portugalio, kunsido en Lisbono, Portugalio)

1997: Ni vin petegas pro Kristo, repaciĝu al Dio (2 Kor 5,20) (Materialo de Nordin Ekmenna Konsilantaro, prepara kunsido en Stokholmo, Svedio)

1998: La Spirito helpas nian malfortecon (Rom 8,14-27) (Prepara materialo el Francio, kunsido en Parizo, Francio)

1999: Dio loĝos kun ili, kaj ili estos Lia popolo (Apo 21,1-7) (Prepara materialo el Malajzio, kunsido en Monaĝejo de Bose, Italio)

2000: Bemata estu Dio kiu benis nin en Kristo (Efe 1,3-14) (Prepara materialo de la Konsilantaro de la Eklezioj de Mezoriento, kunsido en La Verna)

2001: Mi estas la Vojo, la Vero kaj la Vivo (Joh 14,1-6) (Prepara materialo de Rumanio kaj kunsido ĉe Vulcan, Rumanio)

2002: Ĉe Vi estas la fonto de vivo (Psa 36,5-9) (Prepara materialo CEEC kaj CEC, kunsido apud Augsburg, Germanio)

2003: Ni havas ĉi tiun trezoron en argilaj vazoj (2 Kor 4,4-18) (Prepara materialo el eklezioj en Argentino, kunsido ĉe Los Rubios, Hispanio)

2004: Mian pacon mi donas al vi (Joh 14,23-31) (Prepara materialo el Aleppo, Sirio - kunsido en Palermo, Sicilio)

2005: Kristo, unika fundamento de la Eklezio (1 Kor 3,1-23) (Prepara materialo de Slovakio - kunsido en Priestafy, Slovakio)

2006: Ĉar kie du aŭ tri kunvenas en mia nomo, tie mi estas meze de ili (Mat 18,18-20) (Prepara materialo el Irlando - kunsido en Prosperous, Co. Kildare, Irlando)

2007: Li igas la surdulojn aŭdi, kaj la mutulojn paroli (Mar 7,31-37) (Prepara materialo el Sud-Afriko - kunsido en Faverges, Francio)

2008: Preĝu senĉese (1 Tes 5, 12a.13b-18) (Prepara materialo el Usono - kunsido en Graymoor, Garrison, Usono)

2009: Ke ili flarigu unu en Via mano (Eze 37,15-28) (Prepara materialo el Koreio - kunsido en Marsejlo, Francio)

2010: Vi estas atestantoj pri tio (Luk 24,48) (Prepara materialo de Skotlando - kunsido en Glasgovo, Skotlando)

2011: Ili persistis en la instruo de la apostoloj kaj en la kunsileco, en la dispecigo de pano kaj en preĝoj (Ago 2,42) (Prepara materialo el Jerusalemo - kunsido en Saydnaya, Sirio)

2012: Ni ĉiuj estas ŝanĝitaj de la venko de Jesu Kristo nia Savanto (1 Kor 15, 51-58) (Prepara materialo el Pollando - kunsido en Varsovio, Pollando)

2013: Kion la Sinjoro postulas de ni (Mih 6, 6-8) (Prepara materialo el Hindio - kunsido en Bengaluro, Hindio)

2014: Ĉu Kristo estas dividita? (1 Kor 1,1-17) (Prepara materialo el Kanado - kunsido en Montrealo)

2015: Donu al mi trinki (Joh 4,7) (Prepara materialo el Brazilo, kunsido en São Paulo)

2016: Vokitu por amonci al ĉiuj la mirindaĵojn de Dio (kp. 1 Pet 2,9) (Prepara materialo el Latvio - kunsido en Riga)

2017: La amo de Kristo pelas nin al la repaciĝo (kp. 2 Kor 5, 14-20) (Prepara materialo Germanio)

2018: Via dekstra mano, ho Eternulo, estas glora per forto (Eli 15,6) (Prepara materialo - Karibio)

2019: Justecon, justecon sekvu (Readmono 16,11-20) (Preparita de la kristanoj en Indonezio)

2020: Ili montris al ni neordinaran bonecon (Ago 28, 2) (Preparitaj de la kristanoj de Malto)

2021: Restadu en mia amo kaj vi multe fruktodonos (Joh 15,5-9) (Preparita de la Komunumo de Grandchamp)

# PREĜOSEMAJNO

## POR LA UNUECO DE LA KRISTANOJ

### RESTADU EN MIA AMO

### KAJ VI MULTE FRUKTODONOS

### (Joh 15,5-9)

18. - 25.01.2021

IKUE

Romo/Zagrebo, januaro 2021

## Tradukis IKUE-anoj kaj aliaj bonvolaj Esperantistoj:

- Alberto García Fumero, Ciudad de La Habana, Kubo
- Antonio De Salvo, Gaidonia, Italio
- Bernard Schwaiger, Arnstadt, Germanio
- Carmel Mallia, Zabbar, Malto
- Cristian Mocanu, Deva, Rumanio
- Daniel Chevalier, Ecquevilly, Francio
- Edvige Ackermann, Trieste, Italio
- Elda Doefner, Trieste, Italio
- Im Hama, Seoul, Koreio
- Jitka Skalicka, Roma, Italio
- Karl Reinisch, Graz, Austrio
- Laura Gentili, Arezzo, Italio
- Marija Belošević, Zagreb, Kroatio
- Mike Leon, Lower Hutt, Novzelando
- Milton Lacerda, Santos, Brazilo
- Paola Birgit Giommoni, Arezzo, Italio
- Pavol Petrik, Pečovská Ves, Slovakio
- sac. Serhij Prutko, Kievo, Ukrainio
- Uilso Aragono, Mata De Prata, Brazilo
- Veronika Kirsch, Szekszárd, Hungario
- Vitor Luiz Rigoti Dos Anjos, Serra (Espírito Santo), Brazilo

Muzike prilaboris: Stefan Lepping

Kantoj troveblas: [www.fontoj.net](http://www.fontoj.net)

Reviziis: Antonio De Salvo

Kompilis kaj grafike aranĝis: Marija Belošević

La E-lingvaj tekstoj estas faritaj laŭ la tekstoj aprobitaj de la Papa konsilio por antaŭenigo de unueco de kristanoj kaj de la Komisiono „Fido kaj Konstitucio“ de la Tutmonda konsilio de eklezioj (WCC)

Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista  
Via di Porta Fabbrica 15 IT-00165 ROMA RM, Italio  
✉ [ikue@ikue.org](mailto:ikue@ikue.org) ✉ [ikue.reto@gmail.com](mailto:ikue.reto@gmail.com)  
🌐 [www.ikue.org](http://www.ikue.org) 🌐 [www.esperokatolika.org](http://www.esperokatolika.org)  
📠 Fejsbuko de IKUE: [goo.gl/Vv21BD](https://www.facebook.com/ikue)  
📻 [www.radio-vatikana-esperanto.org](http://www.radio-vatikana-esperanto.org)

## PREĜOSEMAJNO POR LA UNUECO DE LA KRISTANOJ TEMOJ 1968-2021

En 1968, estis unue uzitaj materialoj kune preparitaj de la Komisiono pri Fido kaj Konstitucio de la Monda Konsilio de Eklezioj, kaj la Papa Konsilantaro pri la Antaŭenigo de Unueco de la Kristanoj.

- 1968: Por laŭdo de Lia gloro (Efe 1,14)
- 1969: Vokitaj al libereco (Gal 5,13) (Prepara kunsido en Romo, Italio)
- 1970: Ni estas kunlaborantoj kun Dio (1 Kor 3,9) (Prepara kunsido ĉe la monaĥejo de Niederaltaich, Federacia Respubliko Germanio)
- 1971: ... kaj la kuneco de la Sankta Spirito (2 Kor 13,13)
- 1972: Novan ordonon mi donas al vi (Joh 13,34) (Prepara kunsido en Ĝenevo, Svislando)
- 1973: Sinjoro, instru nin preĝi (Luko 11,1) (Prepara kunsido ĉe la abatejo de Montserrat, Hispanio)
- 1974: Ĉiu langa konfeso, ke Jesuo Kristo estas Sinjoro (Fil 2,1-13) (Prepara kunsido en Ĝenevo, Svislando)
- 1975: La celo de Dio: sunigi en Kristo ĉion (Efe 1,3-10) (Materialo de aŭstralia grupo. Prepara kunsido en Ĝenevo, Svislando)
- 1976: Ni estos similaj al li; (1 Joh 3,2) aŭ, Alvokita fariĝi tio, kio ni estas (Materialo de Kariba Konferenco de Eklezioj. Prepara kunsido en Romo, Italio)
- 1977: Kune elteni en espero (Rom 5,1-5) (Materialo el Libano, dum interna milito. Prepara kunsido en Ĝenevo)
- 1978: Jam ne fremduloj (Efe 2,13-22) (Materialo de ekumena grupo en Manĉestro, Anglio)
- 1979: Servu unu al la alia por la gloro de Dio (1 Pet 4,7-11) (Materialo el Argentino - prepara kunsido en Ĝenevo, Svislando)
- 1980: Venu via regno (Mat 6,10) (Materialo de ekumena grupo en Berlino, GDR, prepara kunsido en Milano)
- 1981: Unu Spirito - diverseco de donacoj - unu korpo (1 Kor 12,3b-13) (Materialo de Graymoor Fathers, Usono - prepara kunsido en Ĝenevo, Svislando)
- 1982: Ke ĉiuj trovu sian hejmon en vi, ho Sinjoro (Psa 84) (Materialo de Kenjo - prepara kunsido en Milano, Italio)
- 1983: Jesuo Kristo - la Vivo de la Mondo (1 Joh 1,1-4) (Materialo de ekumena grupo en Irlando - prepara kunsido en Céligny (Bossey), Svislando)
- 1984: Alvokitaj esti unu per la kruco de nia Sinjoro (1 Kor 2,2 kaj Kol 1,20) (prepara kunsido en Venecio, Italio)
- 1985: De morto al vivo kun Kristo (Efe 2,4-7) (Materialo el Jamaiko - prepara kunsido en Grandchamp, Svislando)
- 1986: Vi estos miaj atestantoj (Ago 1,6-8) (Materialo el Jugoslavio/Slovenio, prepara kunsido en Jugoslavio)
- 1987: Unuiĝinta en Kristo - Nova Kreitaĵo (2 Kor 5,17-6,4a) (Materialo el Anglio, prepara kunsido en Taizé, Francio)
- 1988: La amo de Dio eljetas timon (1 Joh 4,18) (Materialo el Italio, prepara kunsido en Pinerolo)
- 1989: Konstrui komunumon: unu korpo en Kristo (Rom 12,5-6a) (Materialo el Kanado - prepara kunsido en Whaley Bridge, Anglio)
- 1990: Ke ili ĉiuj estu unu ... Ke la mondo kredis (Joh 17) (Materialo el Hispanio - prepara kunsido en Madrido, Hispanio)
- 1991: Gloru la Eternulon ĉiuj popoloj! (Psa 117 kaj Rom 15,5-13) (Materialo el Germanio - prepara kunsido en Rotenburg der Fulda, FR Germanio)
- 1992: Mi estas kun vi ĉiujn tagojn... Iru do (Mat 28,16-20) (Materialo el Belgio - prepara kunsido en Bruĝo, Belgio)
- 1993: Porti la fruktojn de la Spirito por la unueco de kristanoj (Gal 5,22-23) (Materialo el Zairio - prepara kunsido apud Zuriko, Svislando)

## KELKAJ GRAVAJ DATOJ ĜLOSILAJ DATOJ EN LA HISTORIO DE LA PREĜOSEMAJNO POR LA UNUECO DE LA KRISTANOJ

ĉ. 1740: En Skotlando, pentekosta movado ligita kun Nord-Ameriko, kies refervoriga mesaĝo entenas preĝojn por kaj kun ĉiuj eklezioj

1820: Sac. James Haldane Stewart publikigis „Sugestojn por la Ĝenerala Unio de kristanoj cele al la elfluso de la Spirito“ (Hints for the outpouring of the Spirit) 1840: Sac. Ignatius Spencer, konvertito al la Roma Katolikismo, sugestas „Unuiĝon de preĝado por Unueco“

1867: La Unua Konferenco de anĝlikanaj episkopoj en Lambeth emfazas preĝadon por unueco en la enkonduko de siaj rezolucioj

1894: Papo Leono la 13-a kuragiĝas praktikon de la Preĝosemajno por la unueco kadre de festo de Pentekosto

1908: Unua okazigo de la „Preĝosemajno por la unueco de Eklezio“ en la januara tempo kaj laŭ hodiaŭa maniero iniciatita de sac. Paul Wattson

1926: La Movado „Fido kaj Konstitucio“ komencas publikigon de „Sugestoj por preĝosemajnoj por la unueco de la kristanoj“ okaze de Pentekosto

1935: En Francio katolika pastro Paul Couturier laboras por Ĝenerala semajno de preĝo por la unueco de la kristanoj bazita sur la komuna preĝo por „unueco kiel Kristo deziras, per agoj kiujn Li deziras“

1941: Komisiono „Fido kaj Konstitucio“ translokas la preĝon al januaro konforme al antaŭaj katolikaj iniciatoj, por ke kristanoj povu komune preĝi en la sama jarsezono

1958: La Ekumena centro „Kristana unueco“ el Liono en Francio komencis pretigi materialon por la Preĝosemajno kunlaborante kun la Komisiono „Fido kaj Konstitucio“ de la Tutmonda (Ekumena) Konsilio de Eklezioj

1964: Papo Paŭlo la 6-a kaj patriarko Atenagora la 1-a en Jerusalemo kune preĝas preĝon de Jesuo „ke ĉiuj estu unu“ (Joh 17, 21)

1964: La „Dekreto pri ekumenismo“ de la Dua vatikana koncilio substrekas ke la preĝo estas spirito de la ekumena movado kaj ĝi subtenas Preĝosemajnon por unueco

1966: La Komisiono „Fido kaj Konstitucio“ de la Tutmonda konsilio de Eklezioj kaj la Sekretariejo por la unueco de la kristanoj (hodiaŭ Papa konsilio por antaŭenigo de la unueco de la kristanoj) decidas kune pretigi oficialajn tekstojn por la Preĝosemajno

1968: la unuan fojon la preĝo por la unueco okazis surbaze de la komunaj tekstoj kiujn pretigis „Fido kaj Konstitucio“ kaj Sekretariejo por antaŭenigo de la unueco de la kristanoj (hodiaŭ Papa konsilio por antaŭenigo de la unueco de la kristanoj)

1975: La preĝo por la unueco la unuan fojon okazis surbaze de la tekstoj kiujn pretigis loka ekumena grupo: la bazan tekston tiun jaron pretigis la ekumena grupo el Aŭstralio

1988: La materialoj por la Preĝosemajno por la unueco de la kristanoj estis uzataj ĉe la diservo okaze de la fondo de la Kristana interligo de Malajzio, organo kiu kunligas pli grandajn kristanajn grupojn en tiu lando

1994: La teksto por tiu jaro estis pretigita kunlaborante kun la laikaj ekumenaj unuiĝoj de kristana junularo Kristana unuiĝo de la vira junularo (YMCA) kaj Kristana unuiĝo de la ina junularo (YWCA)

2004: La Papa konsilio por antaŭenigo de la kristanoj (Katolika Eklezio) kaj Komisiono „Fido kaj Konstitucio“ de la Tutmonda konsilio de eklezioj (WCC) atingas interkonsenton kiu plifortigas la kunlaboron, ke la materialoj por la Preĝosemajno por la unueco en la angla kaj francaj lingvoj estos komune kaj preparita kaj eldonita

2008: en la tuta mondo oni celebris 100-jarojn de la Preĝosemajno por la unueco de la kristanoj

2010: Estas solene celebrata en Edinburgo kaj en la tuta mondo, per diversaj eventoj, la unua jarcento de la misia Konferenco de Edinburgo, dato kiu markas ankaŭ la komencon de la moderna ekumena Movado

Estimataj,

En la manoj la naŭan jaron sinsekve vi tenas libreton, kiu estas komuna tradukado de deksepope de bonvolaj personoj kiuj per disponigo de sia libera tempo ankaŭ montras propran elekton: esti guteto en la maro da deziroj „*Ke ĉiuj estu unu*“. Denove ĉi jare, ne pretendante grandecon, tamen oni povas konstati ke la teamo iel montras la universalecon, tutglobecon en la pozitiva senco (Brazilo, Francio, Germanio, Hungario, Italio, Koreio, Kroatio, Kubo, Malto, Novzelando, Rumanio, Slovakio, Ukrainio). Dankon al la kunlaborantoj!

Pro la aktuala situacio bedaŭrinde en pluraj lokoj ne okazos la tradiciaj preĝokunvenoj aŭ ilin povos partopreni malmultaj. Sed malgraŭ tio, la tekstoj por la semajno estis tradukitaj al pluraj lingvoj. Do, certe vi trovos ĝin ankaŭ en iuj al vi konataj lingvoj. Pro tio certe iuj starigos demandojn: kial la traduko al Esperanto estis farita? Mi deziras memori al vi, ke jam de kelkaj jaroj ĉe la tit-ejo de IKUE aperas tradukoj de la ĉefaj tekstoj. Interalie, sur tiuj tekstoj baziĝis ankaŭ la Ekumenaj diservoj dum la UK en Bjalistoko, Hanojo, Rejkjaviko, Bonaero, Lillo, Nitro, Lisbono, Lahtio kaj ĉiutagaj preĝoj dum la Ekumenaj E-kongresoj.

Ĉi tiu kompilaĵo havas pluran utileblecon. La unuan fojon al la tekstoj ni aldonas la proponojn de la kantoj elektitaj el ADORU.

Jen kelkaj ideoj:

- preĝorondoj: jam utiligas diversajn interretajn kontaktojn, do oni povos similan fari ankaŭ dum la Preĝosemajno
- oni povos ankaŭ sola preni tekston de la koncerna tago kaj mediti super la elektitaj bibliaj tekstoj
- certe la kompilaĵo estas varme rekomendata al la organizantoj de E-arangoj, ĉar necesas nur elekti "tagon" kaj okazigi ekumenan preĝokunvenon, grandaj arangoj kiel Universala Kongreso, kaj simile jam havas pretan tekston por la Ekumena diservo

Gravas la mencio, ke la tekstoj ne estas nur por la semajno inter la 18-a kaj 25-a de januaro.

Libere uzu ilin dum la tuta jaro, ĉar preĝi neniam sufiĉas. Se vi iel utiligos la tekstojn, bv. sciigi, ĉefe se vi havis iun alian ideon ol supre menciitajn.

Ĉe la fino de ĉi linioj, mi dankas al ĉiuj kuntradukintoj kaj mi esperas ke ĉi sperto estas kuragiĝa, kaj malfermis perspektivon por iu estonta simila laboro.

*Kaj fine la invito:*

*tiuj kiuj deziras povas aliĝi al la kunpreĝado per ZOOM, kiam ĉiunvespere inter la 18-a kaj 25-a de januaro organizos IKUE (aliĝo: ihu.reto@gmail.com).*

Pacon kaj bonon!

Marija Belošević, prezidantino de IKUE

## LA BAZA TEKSTO DE LA PREGOSEMAJNO (Joh 15,1-17)

Mi estas la vera vinberarbo,  
kaj mia Patro estas la kultivisto.  
Ĉiun nefruktodonan branĉon en mi Li forprenas;  
kaj ĉiun fruktodonan branĉon Li purigas,  
por ke ĝi donu pli da frukto.  
Jam vi estas puraj pro la vorto, kiun mi parolis al vi.  
Restadu en mi, kaj mi en vi.  
Kiel la branĉo ne povas de si mem doni frukton,  
se ĝi ne restas en la vinberarbo,  
tiel ankaŭ vi ne povas, se vi ne restas en mi.  
Mi estas la vinberarbo;  
vi estas la branĉoj;  
kiu restadas en mi, kaj mi en li,  
tiu donas multe da frukto;  
ĉar sen mi vi nenion povas fari.  
Se iu ne restas en mi, tiu estas elfjetita,  
kiel la branĉo, kaj sekigigas;  
kaj oni ilin kolektas kaj jetas en fajron, kaj ili brulas.  
Se vi restadas en mi, kaj miaj vortoj restadas en vi,  
petu kion ajn vi volos, kaj tio estos farita por vi.  
En tio mia Patro estas glorata,  
ke vi donas multe da frukto;  
kaj vi estos miaj disĉiploj.  
Kiel la Patro min amas, tiel mi ankaŭ vin amas;  
restadu en mia amo.  
Se vi observos miajn ordonojn,  
vi restados en mia amo tiel same,  
kiel mi observis la ordonojn de mia Patro kaj restadas en Lia amo.  
Tion mi parolis al vi, por ke mia ĝojo en vi restadu, kaj via ĝojo estu plena.  
Jen estas mia ordono:  
ke vi amu unu alian tiel same, kiel mi vin amas.  
Neniu havas amon pli grandan ol tio,  
ke iu demetas sian vivon por siaj amikoj.  
Vi estas miaj amikoj, se vi faras tion, kion mi al vi ordonas.  
Mi jam ne nomas vin sklavoj, ĉar la sklavoj ne scias,  
kion lia sinjoro faras; sed mi nomas vin amikoj, ĉar ĉion,  
kion mi aŭdis de mia Patro, mi sciigis al vi.  
Vi ne elektis min, sed mi elektis vin, kaj starigis vin,  
por ke vi iru kaj donu frukton, kaj ke via frukto daŭru;  
por ke la Patro donu al vi ĉion ajn, kion vi petos de Li en mia nomo.  
Tion mi ordonas al vi, por ke vi amu unu la alian.

kontinentoj, kiuj celas doni signifon al siaj vivoj, al kristanoj de diversaj konfesioj, fratinoj kaj fratoj de aliaj komunumoj, foje judoj, islamanoj kaj anoj de aliaj religioj, kaj al homoj sen iuj specifaj religiaj ligiloj. Tiel la komunumo volas fariĝi preĝdomo por ĉiuj, loko de bonvenigo, dialogo kaj renkontiĝo.

La malriĉeco de aliaj religiaj komunumoj malfermis novan servon, kiu devigas la fratinojn aŭskulti kun aliaj religitoj kaj distingi kiel respondi al la vokoj al ili adresitaj. Estas nova graco povi esti preĝloko kaj signo de repaciĝo kune. Tiel, dum ses jaroj, unu el la fratinoj de Grandchamp loĝas en Francio en ekumena fratinaro, kiu konsistas el fratinoj el kvar malsamaj komunumoj. Jam kelkajn jarojn fratinoj faras simplajn vojaĝojn dum la daŭro de trimonata vizo por sperti vivon en Israelo. Unu el la fratinoj aliĝis al fratineco de la Malgrandaj Fratinoj de Jesuo por dividi sian ĉiutagan vivon. Iom poste du aliaj fratinoj spertis vivon en komunumo de Karmelanoj de sankta Jozefo. Hodiaŭ iuj fratinoj ĉeestas en Taizé senformale. Ĉi tiuj novaj spertoj alportas novajn donacojn al la komunumo.

La laboro de la Monda Konsilio de Eklezioj okupas gravan lokon en la preĝo de Grandchamp. Ĉiun lundon vespere la fratinoj preĝas kun la propetoj de la Ekumena Preĝa Rondo proponita de la MKE. La fratinoj havis la privilegion partopreni plurajn asembleojn de MKE - en Vankuvero, Hararo kaj Porto Alegre. Dum kelkaj jaroj la fratinoj ĉeestis ĉe la Ekumena Instituto ĉe Bossey, malgranda komunumo de preĝo, gastamo kaj amikeco dum la monatoj de la postdiploma lernejo.

Religia vivo okupas privilegian lokon - kvankam tre kaŝitan - sur la vojo de la repaciĝo de la eklezioj. Ĝi kantas pri la restrektinta Kristo, la donaco de komuneco ĉiam oferata, kiun la Sankta Spirito florigas en multego da vizaĝoj kaj donacoj. Ĝi povas servi kiel fermentaĵo en la pasto, fermento de unueco, ĉar ĝi kondukas nin al la profundo de la mistero de fido, sur vojo de kontinua konvertiĝo, de transformiĝo. Kaj en iuj cirkonstancoj religia vivo povas helpi individuojn transcendi sin. Foje, kaj ne sciante de ni, tio povas havi postefikojn en iu alia parto de la Korpo de Kristo. André Louf esprimis tion per jenaj vortoj: En dividita eklezio, la monaĥejo instinkte konsistigas la „neries landon“ de la Spirito. La monaĥejo devas esti ekumena lando plejbonece. Ĝi povas antaŭformi komunumojn, kiuj ekzistas aliloke nur esperante. Kie ajn ĝi estas, monaĥejo ne fundamente apartenas al ortodoksismo aŭ katolikismo tiom, kiom ili ankoraŭ provizore kontraŭstaras. Ĝi jam estas signo de la nedividita eklezio, al kiu la Spirito potence gvidas nin hodiaŭ. (Dom André LOUF, prelego la 16-an de decembro 1979 en la katedralo Notre-Dame en Parizo por la inaŭguro de la jaro de sankta Benedikto.)

Por pliaj informoj vizitu: [www.grandchamp.org](http://www.grandchamp.org)

de ni.“ (Frère Roger de Taizé, Les écrits fondateurs, Dieu nous veut heureux. Taizé: Les Ateliers et Presses de Taizé, 2011) p. 121.)

Tre baldaŭ, kunlabore kun la fratoj de Taizé kaj la Fratinetoj de Jesuo, la fratinoj ankaŭ estis vokitaj trovi la simplan ĉeston de preĝo kaj amikeco en malgrandaj komunumoj en lokoj ofte malriĉaj, precipe en Algerio, Israelo, Libano kaj en laboristaj kvartaloj en diversaj landoj de Eŭropo. La profundaj ligoj forĝitaj kun iliaj najbaroj kaj la lokaj eklezioj ebligis al ili eltrovi la diversecon de liturgiaj ritoj en la universala eklezio kaj malfermis ilin al renkontoj kun aliaj religioj.

La ekumena vokiĝo de Grandchamp devontigas ĝin al la laboro de repacigo inter kristanoj, ene de la homa familio, kaj ankaŭ al la respekto je la tuta kreitaro. Kiel komunumo, la fratinoj de Grandchamp tre rapide eltrovis ke ĉi tiu vokiĝo devigas ilin enkorpiĝi repacigon, antaŭ ĉio ene de si kaj inter si. Efektive, tuj post la Dua Mondmilito, al la unuaj svisaj kaj francaj fratinoj aliĝis germanaj kaj nederlandaj fratinoj (markitaj de la lastaj jaroj) kaj poste fratinoj el Indonezio, Aŭstrio, Kongo, Ĉeĥa Respubliko, Svedio kaj Latvio, apartenantaj al diversaj konfesioj. La komunumo aktuale havas ĉirkaŭ kvindek fratinojn de diversaj generacioj.

Kiel ĉiuj baptitoj, la fratinoj estas vokataj fariĝi tio, kio ili jam estas je pli profunda nivelo: estuloj en komunigo. Kiel ni povas fari tion se ni ne lernas akcepti nin mem kun niaj diferencoj? Ili estas donaco de Dio, kaj fortega defio, la defio trovi unuecon en diverseco laŭ nia malgranda mezuro: diverseco de konfesioj, de lingvoj, de kulturoj, de generacioj, tial de manieroj preĝi, pensi, fari, esti en rilatoj, kaj diverseco de karakteroj. Kiel do oni povas labori por repacigo se ne per la travivo de pardonemo tagon post tago? Unue, tio necesigas prilabori la interman memon kaj poste prilabori niajn rilatojn, fidante la mizerikordon de Dio. Ĝi komenciĝas ene de niaj koroj, kie troviĝas la radikoj de ĉiuj disigoj, la plej profundaj vundoj kiuj atendas esti vizitataj por akcepti la pacon de Dio. La unueco inter ni sekve estas la frukto de la malrapida kaj pacienca transformo de niaj vivoj, kiun la Spirito plenumas kun nia konsento.

Liturgia preĝo estas la spino de la tago de Grandchamp kaj kolektas la komunumon kvar fojojn ĉiutage. La diversaj tempoj de liturgia kultado helpas la fratinojn internigi la vivon de Kristo per la Sankta Spirito.

La ikono de la Triumfo en la centro de la kapelo de Grandchamp bonvenigas la fratinojn silente. Ĝi invitas ilin eniri la komunecon de amo inter la Patro, la Filo kaj la Sankta Spirito, lasi ĉi tiun amon kreski interne kaj flui inter ili kaj al tiuj, kiuj venas kiel vizitantoj. Tiam ofte okazas interŝanĝo de donacoj. La fratinoj ŝatas diri, ke ili ĉiam ricevas pli, ol ili donas!

Ĉi tiu bonvenigo ebligis surprizajn renkontojn kun homoj, kiuj konsciis la komunumon pri la neperforto de la evangelio: Jean kaj Hildegard Goss, Joseph Pyromet kaj Simone Pacot, kiuj iniciatis la kunsidojn „Bethesda“, profunda evangelizado. Samtempe la konscio de la fratinoj pri ekologio kreskis en tre palpebla maniero per la disvolvigo de organika ĝardeno, ilia uzo de ekologiaj produktoj kaj zorgema konsidero pri la maniero nutri sin, vojaĝado, administrado de varoj, kaj kion signifas vivi solidare. Tial la fratinoj zorgas pri ligoj kaj interŝanĝoj kun aliaj komunumoj, grupoj, movadoj kaj sindediĉaj homoj, precipe kun la retoj de religiaj kaj/aŭ monaĥaj komunumoj sur la lokaj, regionaj, internaciaj kaj ekumenaj niveloj, kun ekumena kaj interreligia dialogo, movadoj por repacigo, justeco, paco kaj la integreco de kreaĵaro.

Malgraŭ renovigo, por kiu la fratinoj dankas, same kiel multaj aliaj komunumoj en Eŭropo, ili ankaŭ alfrontas la malfortigon de sia vivsango – maljuniĝo, kiu devigas ilin krei. Same kiel la unuaj fratinoj devis dependi de helpo de aliaj, tial la fratinoj hodiaŭ dependas de ekstera helpo por bonvenigi aliajn. La volontula laboro, kiun ili ofertas, estas kundivido de sia vivo de preĝo kaj laboro. Ĝi estas antaŭ ĉio malferma al gejunuloj, sed ĝi estas ankaŭ sen aĝaj limoj kaj malfermita al homoj de ĉiuj

## RESTADU EN MIA AMO KAJ VI MULTE FRUKTODONOS (Joh 15,5-9)

La Preĝosemajno por la unueco de la kristanoj 2021 estis preparita de la *Monaĥa Komunumo de Grandchamp*. La temo elektita: „*Restadu en mia amo kaj vi multe fruktodonos*“ (Joh 15,5-9) estas bazita sur Johano 15,1-17 kaj eksplikas la vokiĝon por preĝado, repaciĝo kaj unuigo en la eklezio kaj en la homa familio de la grupo de Grandchamp.

En la jaro 1930 nombro de Reformiraj virinoj de francdevena Svislando, apartenantaj al grupo konata kiel la *Virinoj de Morges*, retrovis la gravecon de la silento, aŭskultante la Dian Vorton. Samtempe ili revivigis la praktikon de spiritaj retiriĝoj por riĉigi sian fido-vivon, inspiritaj de la ekzemplo de Kristo, kiu apartiĝis por preĝi. Aliaj baldaŭ aliĝis, partoprenante regule organizitajn retiriĝojn en Grandchamp, vilaĝeto apud la bordo de lago Neuchâtel. Sekve, oni bezonis trovi konstantan ejon por preĝi kaj bonvenigi la kreskantan nombron de gastoj kaj retiriĝantoj.

Hodiaŭ la komunumo entenas kvindek monaĥinojn, ĉiujn el diversgeneracioj, ekleziaj tradicioj, landoj kaj kontinentoj. En sia diverseco, la monaĥinoj similas al vivanta, kuraĝiga alegorio. Ili okazigas preĝad-vivon, komunan vivadon kaj prizorgas la bonvenon de gastoj. La monaĥinoj kundividis la plenumon de la monaĥina kuniĝo kun vizitantoj kaj helpantoj kiuj vizitas Grandchamp por preĝi, silenti, spirit-saniĝo, aŭ serĉas la viv-percepton.

La unuaj monaĥinoj spertis la doloron de la disdivido inter la Kristanaj eklezioj. En ĉi tiu luktado, ili estis kuraĝigitaj per la amikeco de Abbé Paul Courtrier, pioniro de la Preĝo-Semajno cele al kristana unueco. Sekve ekde sia komenco, preĝado por la Kristana Unuigo estis ĉe la centro de la komunuma vivo. Ĉi tiu sindevontigo, kune kun la fideleco de Grandchamp por la tri kolonoj de preĝado, nome: komuna vivo kaj gastamo, formas la bazon de ĉi tiuj aferoj.

### Restadi en la Dia Amo signifas repaciĝi

La francaj vortoj por monaĥo kaj monaĥino (moine/moniale) devenas de la greka lingvo, signifikantaj 'sola' kaj 'unu'. Niaj koro, korpo kaj menso, anstataŭ esti unu, estas ofte disigitaj, diversdirekte. La monaĥo aŭ monaĥino deziras esti unu en si mem kaj unuigitaj en Kristo. „Restadu en mi samkiel mi restadas en vi,“ diras Jesuo (Joh 15,4a). Integra vivo antaŭsupozas vojon de memakceptado, de repacigo kun niaj personaj kaj hereditaj historioj.

Jesuo diris al siaj disĉiploj: „restadu en mia amo“ (Joh 15,9). Li restadas en la amo de la Patro (Joh 15,10) kaj deziras nenion alian, ol kundividi ĉi tiun amon kun ni. „Mi nomis vin amikoj, ĉar ĉion kion mi aŭdis de mia Patro mi sciigis al vi.“ (Joh 15,15b). Greftita en la vinberujon, kiu estas Jesuo mem, la Patro iĝas nia vinberisto, kiu nin pritondas por nin grandigi. Ĉi tio bildigas, kio okazas en preĝo. La patro estas la centro de nia vivo, kiu centriĝas nin vivon. Li pritondas nin kaj unuigas nin, dum unuigitaj homoj glorigas la Patron.

Restadi en Kristo estas interna sinteno, kiu enradikiĝas en nin iom post iom. Ĝi bezonas spacon por kreski. Ĝi povas esti verukita per la klopdado de la viv-necesaĵoj, kaj ĝi estas miracata de distraĵoj, bruoj, aktivado kaj la defioj de la vivo. Dum la tumulto de Eŭropo en 1938, Geneviève Micheli, kiu poste iĝis Ĉefmonaĥino Geneviève, la unua ĉefo de la grupo, verkis jenajn versojn, ankoraŭ hodiaŭ atentindajn“.

*Ni vivas en tempo, kiu estas ambaŭ ensuiga kaj grandioza, danĝera tempo, kiam nenio prizorgas la animon, kiam rapidaj kaj tute homaj sukcesoj ŝajnas balai ĉion for...Kaj mi kredas, ke nia civilizacio mortos en ĉi tiu komuna frenezco de bruo kaj rapideco, kie neniu povas pensi... Ni kristanoj, bone konantaj la plenvalonon de spirita vivo, portas grandan respondecon, kaj ni devas ĝin realigi, unuigi kaj helpi unu la alian krei kalmecajn fortojn, pacajn rifugejojn, vivigajn centrojn, kie la silentado de la popolo vokas la kreantan vorton de Dio. Temas pri vivo aŭ morto.*

## Restadi en Kristo ĝis ni fruktodonu

„Mia Patro estas per ĉi tio glorata, ke vi multe fruktodonu” (Joh 15,8). Ni ne povas fruktodoni mem. Ni ne povas fruktodoni apartigataj de la vinverujo. Estas la suko, la vivo de Jesuo fluantaj tra ni, kiu produktas la frukton. Resti en la amo de Jesuo, resti branĉo de la vinberujo, fluigas lian vivon tra ni.

Kiam ni atentis Jesuon, lia vivo fluas tra ni. Jesuo invitas nin permesi sian vorton vivi en ni (Joh 15,7), kaj poste, kion ni petas estos akceptita. Per lia vorto ni fruktodonas. Kiel personoj, kiel komunumo, kiel tuta eklezio, ni devas unuiĝi en Kristo, akceptante Lian ordonon, nome: ami unu la alian samkiel Li amis nin (Joh 15,12).

## Se oni restas en Kristo, la fonto de ĉia amo, do la frukto de komuneco kreskas

La komuneco kun Kristo postulas komuneco kun la aliaj homoj. Doroteo de Gaza, monaĥo en Palestino dum la 6-a jarcento, esprimis tion jene:

*Vi imagu cirklojn desegnitajn sur grundo, tio estas, cirklojn liniojn desegnitajn per cirkelo kaj kun centro. Vi imagu, ke tiu cirklo estas la mondo, la centro estas Dio kaj la radioj estas la malsamaj vojoj aŭ vivmanieroj de la popolo. Kiam la sanktaĵoj, dezirante esti desegnitaj proksime de Dio, marŝas al la centro de la cirklo, tiam ju pli ili penetras en ĝian internon, des pli ili fariĝas pli kaj pli proksimaj unuj al la aliaj; kaj, ju pli ili estos proksimaj unuj al la aliaj, des pli ili estos proksimaj al Dio. Ni komprenas, ke la samo aplikiĝas en inversa maniero, kiam ni malproksimiĝas de Dio kaj marŝas ĝis la ekstero de la cirklo. Do evidentiĝas, ke, ju pli ni malproksimiĝas de Dio, des pli ni malproksimiĝas unuj de la aliaj kaj, ju pli ni malproksimiĝas unuj de la aliaj, des pli ni fariĝas malproksimaj al Dio.*

Serĉi la proksimecon kun la aliaj homoj, vivi kune en komuneco kun la aliaj, homoj foje tre malsimilaj al ni, eble estas defio. La fratulinaj de Grandchamp konas tion ĉi deficon kaj, al ili, la instruo de fratulo Roĝer de Taizé estas tre utila: „Ne ekzistas amikeco sen puriganta sufero. Ne ekzistas amo al nia proksimumo sen la kruco. Nur la kruco permesas al ni la konon pri la nekomprenebla profundece de la amo”.

La dividoj inter kristanoj, kiuj malproksimiĝas unuj de la aliaj, estas skandalo ĉar malproksimiĝas nin ankaŭ de Dio. Multaj kristanoj, movataj de la malĝojeco de tia situacio, fervore preĝas al Dio por la restarigo de tia unueco, pri kiu Jesuo preĝis. La preĝo de Jesuo por la unueco estas invito por ke ni revenu al li kaj tiel ni fariĝu pli proksimaj unuj de la aliaj kaj kune ĝojos pri la riĉeco de nia diverseco.

Ĉar ni lernas dum ni vivas en komunumo, do la klopodoj por repaciĝo estas altaj kaj postulas sindediĉon. Ni estas subtenataj de la preĝo de Jesuo, kiu deziras, ke ni sukcesu esti unu tiel, kiel li estas unu kun la Patro, por ke la mondo kredu (Joh 17, 21).

## Se oni restas en Kristo, do la frukto de solidareco kaj de atestado kreskas

Kvankam ni kiel kristanoj restas en la amo de Kristo, ni ankaŭ vivas ene de kreitaro kiu ĝemas dum atendas la liberecon (laŭ Rom 8). En la mondo ni perceptas la malbonojn de suferado kaj de konfliktoj. Per la solidareco al suferantoj, ni permesas, ke la amo de Kristo fluu per ni. La Paska mistero estigas fruktojn en ni tiam, kiam ni ofertas amon al niaj fratoj kaj fratinoj kaj ni nutras la mondon per espero.

Spirita vivo kaj solidareco estas ligitaj nedisigeble. Se ni restas en Kristo, do ni ricevas la forton kaj la saĝecon por agi kontraŭ la strukturoj de maljusteco kaj subpremado, por ke ni agnosku nin kiel fratojn kaj fratinojn en humaneco, kaj por ke ni estu kreantoj de nova vivmaniero, plena je respekto kaj komuneco al la tuta kreitaro.

La resumo de la vivregulato primeditata kune de la fratulinaj de Grandchamp, ĉiutage, ekas per la vortoj „ni preĝu kaj laboru por ke Dio reĝu”. Preĝo kaj ĉiutage vivo ne estas du disigitaj realaĵoj, sed ambaŭ estas faritaj por resti kune. Ĉio, kion ni spertas, estas destinita fariĝi renkontiĝo kun Dio.

## LA KOMUNUMO DE GRANDCHAMP KAJ LA EKUMENA SPERTO DE LA RELIGIA VIVO

[La tutan respondecon pri la publikigo de ĉi tiu teksto surprenas la Komunumo de Grandchamp, kiu verkis la malnetajn tekstojn por la Preĝosemajno por la Unueco de Kristanoj 2021]

En la 1930-aj jaroj, grupo de virinoj de la Reformita Eklezio de franciĝva Svislando nomata la „Sinjorinoj de Morges” retrovis la gravecon de silento en la aŭskultado de la Vorto de Dio, prenante kiel sian modelon Kriston, kiu ofte retiriĝis sola por preĝi. Ili gvidis spiritajn retiriĝojn, kiujn ili baldaŭ malfermis por aliuoj, kaj laŭpaŝe trovis konstantan hejmon por ĉi tiuj retiriĝoj en Grandchamp, vilaĝeto apud Lago Neuchâtel. Poste, la neceso estiĝis de konstanta ĉeesto por preĝado kaj gastigado. Sekve, virino kiu poste fariĝis Fraŭno Marguerite ekloĝiĝis en Grandchamp. Du aliaj virinoj baldaŭ aliĝis al ŝi, el kiuj unu deziris komunuman vivon. Geneviève Micheli, la iniciatinto de ĉi tiuj retiriĝoj, gvidis ĉi tiun modestan komencon pri la preĝo kaj kuraĝis la unuajn tri fratinojn dum ilia vojiro. Laŭ ilia peto, ŝi fariĝis la unua patrino de la komunumo en 1944.

En la komenco, pro tio ke mankis komunumoj de la monaĥa tipo en la eklezioj de La Reformacio, la unuaj fratinoj, senspertaj kaj malriĉaj, havis nek liturgion de la horoj nek vivregulon. Ili tial sin turnis al monaĥejoj de aliaj konfesioj kaj malfermas sin al la trezoroj de tiuj tradicioj. Ili devis lerni ĉion: kiel travivi vivon bazitan sur la Vorto de Dio kaj ĉiutage meditado, kiel vivi komunume kaj kiel akcepti aliuojn.

La unuaj fratinoj suferis pro la disiĝo de kristanoj - precipe Patrino Geneviève, kiu tial komprenis la plenan gravecon de ekumena kaj teologia laboro. Sed ĉi tiu laboro devis esti konstruata sur la bazo de tio, kio estis esenca por ŝi, la preĝo laŭ la lumo de Johano 17:21: „por ke ili ĉiuj estu unu, kiel Vi, Patro, estas en mi, kaj mi en Vi, tiel ili ankaŭ estu en ni; por ke la mondo kredu, ke Vi min sendis.” Ŝi deziris doni sian vivon por unueco en Kristo kaj per Kristo, ĝis la tago kiam Dio estos ĉio en ĉio. La ekumena alvokiĝo de la komunumo tial ne estis elekto sed donaco, graco ricevita jam de la komenco kaj naskiĝinta el malriĉeco.

Ĉi tiun gracon konfirmis kaj stimulis kelkaj decidaj renkontoj. Unu tia renkonto por la novnaskita komunumo estis tiu kun Pastro Paul Couturier. Katolika pastro en Liono, li estis unu el la pioniroj de ekumenismo kaj de la Preĝosemajno por la Unueco de Kristanoj kiel ni konas ĝin hodiaŭ. Profundaj ligoj disvolviĝis inter li kaj la unuaj fratinoj, kaj li fidele akompanis ilin dum ilia spirita vojiro, kiel atestas ilia korespondado. En 1940, li skribis al Patrino Geneviève:

„... Neniu spirita retiriĝo okazis sen tio, ke kristanoj eliras el ĝi kun akuta sufero pro la disiĝoj kaj kun la sindevigo labori por unueco per fervora preĝado kaj laŭpaŝa sinpurigo ... Por mi, la problemo de unueco estas ĉefe kaj fundamente problemo de la orientiĝo de la propra interna vivo. Sekve, vi komprenas kion da graveco mi atribuas al via peto kaj al la laboro de spirita retiriĝo. Ni preĝu fervore, tio estas, lasu ke Kristo estu tre libera ene de ni.”

Alia tre grava renkonto estis tiu kun Roger Schutz, la estonta Frato Roger de Taizé, kiu vizitis Grandchamp en 1940. Lian propran serĉon kuraĝigis tiu de la fratinoj, kun kiuj poste li regule korespondis. Ligoj de komunigo evoluis dum la jaroj pasis kaj ili profundigis en 1953 kiam la Komunumo de Grandchamp adoptis kaj la Regulon de Taizé kaj la Liturgion de la Horoj de Taizé tuj post kiam ĝi estis eldonita. Frato Roger skribis:

„La konstanta serĉo por unueco harmoniigas la homon: ĝi akordigas la personon kun la firo kaj la estantecon kun la ago. Oni akiras ĉi tiun ekvilibron tiom, ke ni penas - per sinsekvaj paŝoj - esti konsekvenca kun tio, kio estas plej bona en ni kaj tio, kio estas ĉe nia plej interna kerno: Kristo ene

## TAGO OKA

### *Repacigi kun la tuta kreitaĵo*

*Por ke mia ĝojo en Vi restadu, kaj Via ĝojo estu plena“ (Joh 15, 11)*

*Kantoj: komenco/fino: ADORU 597 1-2/3-5*

*Kol 1,15-20 En Li, ĉio ekzistas*

Li estas bildo de la nevidebla Dio, la unmenaskito inter la tuta kreitaro; ĉar en li kreiĝis ĉio en la ĉielo kaj sur la tero, ĉio videbla kaj nevidebla, ĉu tronoj, ĉu reĝejoj, ĉu estrecoj, ĉu aŭtoritatoj, ĉio kreiĝis per li, kaj por li; kaj li estas antaŭ ĉio, kaj en li ĉio ekzistas. Kaj li estas la kapo de la korpo, la eklezio; kaj li estas la komenco, la unmenaskita el la mortintoj, por ke li fariĝu superulo en ĉio. Ĉar la Patro bonvolis, ke en li la tuta pleneo loĝu; kaj per li kunakordigi ĉion al Si mem, pacon farinte per la sango de lia kruco; per li ĉion, ĉu sur la tero, ĉu en la ĉielo.

*Mar 4,30-32 Kiel senapa semeto*

Kaj li diris: Al kio ni komparu la regnon de Dio? aŭ per kia parabolo ni montru ĝin? Al sinapa semeto, kiu, kiam ĝi estas semita sur la teron, estas pli malgranda ol ĉiuj aliaj semoj, kiuj estas sur la tero, tamen semite, kreskas kaj fariĝas pli granda ol ĉiuj legomoj, kaj elmetas grandajn branĉojn, tiel ke sub ĝia ombro povas ekloĝi la birdoj de la ĉielo.

## Medito

La himno al Kristo el la letero al la Koloseanoj invitas nin laŭdi la savon de Dio, kiu ampleksas la tutan universon. Per Kristo, krucumita kaj resurektinta, vojo de repaciĝo malfarmigis: ankaŭ la kreitaĵo estas destinata por estonteco de vivo kaj paco.

Kun la okuloj de la fido ni vidas ke la Dia regno estas realeco tre proksima al ni, sed tamen, ankoraŭ eta, preskaŭ nevidebla- kiel senapa semeto. Tamen, ĝi konstante kreskas. Eĉ en la aflikto de nia mondo, la Spirito de la Resurektinta agadas. Li kuragigas nin partopreni- kune kun ĉiuj bonvolaj homoj- en la senlacema serĉado de justeco kaj paco, por ke la Tero denove fariĝu hejmo por ĉiu kreitaĵo. Ni partoprenas en la agado de la Spirito, tial ke la kreitaĵo, en ĉiu sia pleneo, daŭre laŭdu Dion. Kiam la naturo suferas, kiam homoj estas disbatitaj, la Spirito de Kristo resurektinta, tute ne permesas al ni malkuragiĝi, male, Li invitas nin partopreni en Lia resaniga ago.

La vivnoveco kiam Kristo alportas, eĉ se kaŝita, estas lumo de espero por multaj. Ĝi estas fonto de repaciĝo por tuta kreitaĵo kaj enhavas ĝojon kiu venas de preter ni: „Por ke mia ĝojo en Vi restadu, kaj Via ĝojo estu plena“ (Joh 15,11).

*Ĉu Vi volas celebri la vivnovecon, kiam Kristo donas pere de Sankta Spirito kaj fari, ke ĝi vivu en Vi mem, inter ni, en la Eklezio, en la mondo kaj en la tuta kreitaĵo?*

*(Dua promeso dum la enirceremonio en la Komunumon de Grandchamp)*

## Preĝo

Ho trifoje sankta Dio, mi dankas Vin, ĉar ke Vi kreis kaj amas nin.  
Mi dankas Vin pro Via ĉeesto ene de ni kaj en la kreitaĵo.  
Faru ke ni lernu rigardi la mondon kiel Vi rigardas ĝin, kun amo.  
Esperante akiri tiam vidon, ni povu labori por mondo,  
kie la justeco kaj paco floru, por la gloro de Via nomo.  
Amen

## PREPARO DE LA MATERIALO

Por pretigi la materialon de la Preĝosemajno 2021 oni kolektigis en Grandchamp, Aruse, en la kantono Neuchâtel en Svislando, de la 15-a ĝis la 18-a de septembro 2019. La Ekumena Konsilantaro de la Eklezioj invitis la komunumon de Grandchamp elekti la temon kaj redakti la tekston por la semajno.

La tuta komunumo laboradis dum pluraj monatoj pri la verko de ĉi tiu teksto, kiu konsistigis la fundamenton sur kiu poste laboris la Internacia Komisiono. Kvar monakinoj de la Komunumo kunlaboris kun la Internacia Komisiono dum la septembra renkontiĝo, kiu estis kune moderigita de la direktoro de la Komisiono Kredo kaj Konstitucio, la respektinda Odair Pedroso Mateus, kaj de la oficisto de la Papa Konsilio por la promocio de la unueco inter la Kristanoj, la respektinda Anthony Currer. La komunumo de Grandchamp estas monakina komunumo kolektanta monakinojn el pluraj kristaraj tradicioj kaj el malsamaj landoj. La komunumo estis fondita je la unua duono de la dudeka jarcento kaj ekde la komenco ĝi starigis firmajn ligilojn ĉu kun la komunumo en Taizé, ĉu kun pastro Paul Couturier, grava persono en la historio de la Preĝosemajno. Hodiaŭ la komunumo enhavas ĉirkaŭ kvindek monakinojn, sin dediĉantajn al la serĉado de repaciĝaj itineroj inter la kristanoj, en la homa familio kaj en la respekto de la tuta kreaĵo.

La temo elektita de la Komunumo estas „*Restadu en mia amo: vi produktos multe da fruktoj*“. (Joh 15, 5-9), kiu permesis al la monakinoj kundiĉi la sperton kaj la sekvon de sia kontemplanta vivo, greftita en la amo de la Sinjoro, kaj paroli pri la frukto de tiu ĉi preĝado: plej profunda komuneco kun siaj gefratoj en Kristo kaj pli granda solidareco kun la tuta kreaĵo.

Membroj de la Internacia Komisiono:

- sinjorino Anne-Noel Clément, Unité Chrétienne
- respektinda Peter Colwell, ĝenerala vicsekretario de Eklezioj kune en Britio
- respektinda Anthony Currer, Papa Konsilio por la promocio de la Unueco inter la kristanoj
- doktorino Ari Ghazaryan Drisi, oficistino de la Komisiono Kredo kaj Konstitucio de CEC
- sinjorino Virag Kinga Meezei, staĝarino ĉe CEC
- doktorino Hanne Lamparter, de la Germana Luterana Eklezio
- fratino Leticia Candelario Lopez, Misiista Gefratraro Verbun Dei (Singapuro)
- respektinda doktoro Odair Pedroso Mateus, Direktoro de la Komisiono Kredo kaj Konstitucio
- pastro James Puglisi, Franciskanoj Monakoj de la Atonement, Centro por Umiaĝo
- doktoro Mikie Roberts, respondeculo de la Spirita Vivo de CEC
- doktorino Clare Watkins Universitato de Roehampton

Membroj de la Komunumo en Grandchamp kiuj partoprenis en la renkontiĝo de la Internacia Komisiono: fratino Arne-Emmanuelle Guy, fratino Gesine Rohrbach, fratino Embla Vegerfors, fratino Svenja Wichmann.

La tasko kiel sekretario estis plenumita de sinjoro Alexander Freeman de CEC.

## DISERVO - ENKONDUKO

Tiu ĉi diservo sekvas la preĝmanieron de la monaĥinoj de Grandchamp en ilia tradicio, tri celebradoj el iliaj monakaj preĝoj – kelkfoje nomataj „vigilioj” en la benediktana tradicio – ĉar kutime recitataj nokte, estas arigitaj al unu sola vesperpreĝo. Same, nia celebrado por la Preĝosemajno por la unueco de la kristanoj konsistas el tri partoj, tri preĝomomentoj laŭ la skemo de la Komunumo de Grandchamp. Ĉiu preĝomomento enhavas legajojn el la Sanktaj Skriboj, kantatan responsorion, silentan momenton kaj kelkajn propetajn preĝojn. Ĉiu unuopa preĝomomento proponas ankaŭ unu konkretan agon laŭ la taga temo. Oni konkludas la preĝadon per la kanto Lumière de Dieu (Lumo de Dio), komponita far de unu membro de la Komunumo de Grandchamp (aŭ per iu alia kantola kanto). La unua preĝomomento konsciigas pri la unueco de la homo en si mem kaj vivi en Kristo. La partoprenantoj estas invitatataj iomete silenti plurfoje dum la celebrado. La dua preĝomomento esprimas la deziron revivi videble la unuaĝo inter la kristanoj. Ankritaj ĉe la amo de Kristo, ni turniĝas al la homoj apud ni kaj reciproke ni sindonas signon de dia paco. La tria preĝomomento rilatas la unuecon de ĉiuj popoloj kaj la tutan kreitaron. La gesto estas inspirita de teksto de Doroteo de Gaza (vida la enkondukon al tiu ĉi libreto). Kelkaj partoprenantoj sin metas laŭ rondo kaj sin movas centren. Tio signifas: Dio estas nia centro; ju pli ni alproksimiĝas al Dio, des pli ni alproksimiĝas unu al la aliaj. Ĉi tiuj gestoj povas esti prezentataj diversmaniere laŭ la koreografia vidpunkto, laŭ la disponebla spaco, sed ankaŭ laŭ la uzoj de la diversaj apartenaj tradicioj.

Jen ekzemplo:

- ĉiu persono de kuirveno tenos estingitan kandelon;
- la organizantoj taksos la eblon, ke la kuirveno estu aranĝita en rondo, kun radialaj vojoj por faciligi ĉi tiun geston;
- granda, videbla kandelono (ekzemple granda paska kandelono en multaj tradicioj) estas metita en la centron de la cirklo;
- kelkaj homoj (ses aŭ ok) reprezentantoj de malsamaj kristanaj tradicioj, metas sin ĉe la kandelono en la rondo, laŭ projekto desegnita de la reprezentantoj mem, sidantaj en cirklo;
- ĉiu el ĉi tiuj reprezentantoj (ses aŭ ok) tenas estingitan kandelon en la mano (supre por ke ĝi estu videbla);
- dum la legado akompananta ĉi tiun geston, ĉiu reprezentanto moviĝas mano en mano kun la aliaj al la centro de la cirklo;
- post kiam ili atingas la kandelon en la centro, ili ekbruligas sian propran kandelon kaj revenas inter la kuirvenon, ekbruligante la kandelonojn de ĉiuj fideluloj;
- dum la lumigado de la kandelonoj de la tuta kuirveno oni kantas kanton Lumo de Dio;
- aŭ la Kanton de tiel nomata Lucenario aŭ Lucenaio - temas pri mallonga ekbruliga rito, oni lumigas dimanĉe kandelonojn de la adventa florkrono; oni kantas „Mi kredas je vi, Sinjoro”;
- ĉiuj tenas brulantajn kandelonojn ĝis la fino. En tiuj taŭgaj kaj praktikeblaj lokoj la kuirveno povas iri procesie, kun brulantaj kandelonoj, de la ekstero, de la preĝejo al la ekstero, al la mondo. La malferman litanion legas aŭ, prefere, kantas du malsamaj homoj. Tiel same oni povas legi aŭ kanti la psalmojn aŭ anstataŭigi ilin per kanto taŭga al la temo de la viglado. Responsorioj dum propetaj preĝoj povas esti deklamitaj, kantitaj aŭ anstataŭigitaj per aliaj formuloj.

Liberaj intencoj povas esti aldonitaj al preĝoj de propeto. La muzika repertuaro por la litanioj, responsorioj kaj propetoj ( propetadoj) uzataj de la Komunumo de Grandchamp estas raportitaj post la teksto de la festo, en la sekcio Kantoj por la ekumena festo. La kantoj aŭskultebblas kaj elŝuteblas de la Komunuma retejo: [www.grandchamp.org](http://www.grandchamp.org). Eblas ankaŭ aŭskulti la komunan preĝon de la Komunumo interrete ĉiutage: [www.grandchamp.org/prier-avec-nous](http://www.grandchamp.org/prier-avec-nous)

Noto:

*Por pliriĝi la diservon, ni elektis apartajn kantojn de ADORU ([www.fonoi.net](http://www.fonoi.net)) kiuj jam estas konataj kaj uzataj dum la Ekumenaj diservoj. Cetere, tiuj kiuj deziras aŭskulti la originajn kantojn kaj preĝmanieron de la Komunumo de Grandchamp povas sekvi suprajn ligilojn.*

## TAGO SEPA

*Kreskante en unueco*

*Mi estas la vinberarbo, vi estas la branĉoj” (Joh 15,5a)*

*Kantoj: komenco/fino: ADORU 357, 1-2/3*

*1 Kor 1,10-13; 3: 21-23 Ĉu Kristo estas dividita?*

Mi petegas vin, fratoj, per la nomo de nia Sinjoro Jesuo Kristo, ke vi ĉiuj parolu tion saman, kaj ke estu nenaj skismoj inter vi; sed ke vi estu perfekte kunigitaj en la sama spirito kaj en la sama juĝo. Ĉar pri vi, miaj fratoj, estas sciigite al mi de la domanoj de Floe, ke ekzistas inter vi malpacoj. Kaj la jenon mi volas diri, ke ĉiu el vi diras: Mi estas de Paŭlo; kaj mi de Apolos; kaj mi de Kefas; kaj mi de Kristo. Ĉu Kristo estas dividita? ĉu Paŭlo krucuniĝis por vi? aŭ ĉu vi baptiĝis en la nomon de Paŭlo? Graco estu al vi kaj paco de Dio, nia Patro, kaj de la Sinjoro Jesuo Kristo. Ĉar pro tio, ke en la saĝeco de Dio la mondo per sia saĝeco ne konis Dion, bonvolis Dio per la malsaĝeco de la prediko savi la kredantojn. Ĉar Judoj postulas signojn, kaj Grekoj serĉas saĝecon; sed ni predikas Kriston krucumitan, por Judoj falilon, kaj por Grekoj malsaĝon.

*Joh 17,20-23 Kiel vi kaj mi estas unu*

Kaj mi preĝas ne nur por ili, sed ankaŭ por tiuj, kiuj kredos al mi pro ilia vorto; por ke ili ĉiuj estu unu; kiel Vi, Patro, estas en mi, kaj mi en Vi, tiel ili ankaŭ estu en mi; por ke la mondo kredu, ke Vi min sendis. Kaj la gloron, kiun Vi donis al mi, mi donis al ili; por ke ili estu unu tiel same, kiel ni estas unu; mi en ili, kaj Vi en mi, por ke ili perfektigu en unu; por ke la mondo sciu, ke Vi min sendis, kaj ke Vi ilin amis, kiel Vi min amis.

### Medito

La tagon antaŭ ol morto, Jesuo preĝis por la unueco de tiuj, kiujn la Patro donis al li: „por ke ĉiuj estu unu ... por ke la mondo kredu”. Aliginte al li, kiel branĉo estas al la vinberujo, ni dividas la saman sukcon, kiu cirkulas inter ni kaj vigligas nin.

Ĉiu tradicio celas konduki nin al la koro de nia fido: komuneco kun Dio, per Kristo, en la Spirito. Ju pli ni vivas ĉi tiun komuneco, des pli ni estas ligitaj al aliaj kristanoj kaj al la tuta homaro. Paŭlo avertas nin kontraŭ sinteno, kiu jam minacis la unuecon de la unuaj kristanoj: absolutigi sian propran tradicion malutile al la unueco de la korpo de Kristo. Diferencoj tiam dividas anstataŭ reciproke riĉigi. Paŭlo havis tre larĝan vizion: „Ĉio apartenas al vi, kaj vi al Kristo, kaj Kristo al Dio.” (1 Kor 3,22-23). La volo de Kristo devigas nin al vojo de unueco kaj repaciĝo. Ĝi ankaŭ devigas nin kunigi nian preĝon al lia: „por ke ĉiuj estu unu. ... por ke la mondo kredu”(Joh 17,21).

*Neniam rezigni vin al la skandalo de la disiĝo de kristanoj, kiuj tiel facile konfesas amon al sia proksimado, kaj tamen restas dividitaj. Faru la unuecon de la korpo de Kristo via pasia zorgo.*

*La Regulo de Taizé en la franca kaj la angla (2012) p. 13*

### Preĝo

Sankta Spirito,  
viviga fajro kaj malda spiro, veni kaj restu en mi.  
Renovigu en mi la pasion por unueco  
por ke ni vivu en konscio pri la ligo, kiu kunigas nin en vi.  
Ĉruj, kiuj surmetis Kriston ĉe sia Bapto  
kuniĝi kaj atesti kune pri la espero, kiu vivtenas ilin.  
Amen



ĉirkaŭajn kampojn kaj vilaĝojn kaj aĉetu por si manĝaĵojn. Sed li responde diris al ili: Vi donu al ili manĝi. Kaj ili diris al li: Ĉu ni iru kaj aĉetu panojn por ducent denaroj, kaj donu al ili manĝi? Kaj li diris al ili: Kiom da panoj vi havas? iru, por vidi. Kaj sciiginte, ili diris: Kvin, kaj du fiŝojn. Kaj li ordonis al ili, ke ĉiuj sidigu laŭgrupe sur la verda herbo. Kaj ili sidigis en aroj, centope kaj kvindekope. Kaj li prenis la kvin panojn kaj la du fiŝojn, kaj suprenrigardinte al la ĉielo, li benis kaj dispecigis la panojn, kaj donis al la disĉiploj, por meti antaŭ ilin, kaj li dividis la du fiŝojn inter ĉiuj. Kaj ĉiuj manĝis kaj satigis. Kaj oni kolektis da fragmentoj dek du korbojn, kaj ankaŭ el la fiŝoj. Kaj tiuj, kiuj manĝis la panojn, estis kvin mil viroj.

### Medito

Kiam ni lasas nin transformi de Kristo, Lia amo kreskas, kaj fruktigas en ni. Akcepti la aliuilon estas konkreta maniero dividi la amon, kiu ene de ni estas.

Laŭlonge de sia vivo, Jesuo akceptis ĉiujn, kiujn li renkontis. Li ilin aŭskultis, kaj lasis sin esti tuŝata, ne timante ilian suferon.

En la rakonto pri la multobligo de la panoj, Jesuo kortuŝigas kaj ilin komparas, vidante la malsatan homamason. Li scias, ke la tuta homaro bezonas esti nutrata, kaj ke nur Li vere kapablas forigi la malsaton je pano kaj la soifon je vivo. Sed Li ne deziras tion fari sen la partopreno de la disĉiploj; ne sen la malmulto, kion ili povis oferi: kvin panojn kaj du fiŝojn.

Mem hodiaŭ Lia vokas nin esti Liaj kunlaborantoj je Lia senkondiĉa zorgo pri la aliaj. Kelkfoje io tiom malgranda kiel afabla rigardo, atenta aŭskultado, aŭ nia nura ĉesto, sufiĉas por ke homo sentu sin akceptata. Kiam ni oferas al Jesuo niajn simplajn lertojn, Li ilin utiligas je miringa maniero.

Tiam ni spertas, kion spertis Abrahamo, ĉar dum donacado estas, kiam ni ricevas, kaj kiam ni akceptas la aliajn, ni abunde estas benataj.

Kristo mem estas tiu, kiun ni gastigas.

Angla- kaj franclingva versioj de la Regularo de Taizé (2012), paĝo 103.

*Ĉu la homoj, kiujn ni tagon post tago akceptas, trovas en ni viroj kaj virinoj lumaj per Kristo, nia paco?*

La fontoj je Taizé (2000), paĝo 60.

### Preĝo

Jesuo Kristo,  
ni deziras akcepti la fratojn kaj fratinojn, kiuj kun ni estas.  
Vi scias, kiel ni ofte sentas nin senpovaj antaŭ iliaj suferoj.  
Tamen, Vi ĉiam estas tie, antaŭ ni.  
Kaj Vi jam akceptis ilin en Vian kompton.  
Parolu al ili per niaj vortoj  
Ilin subtenu per niaj agoj, kaj lasu Vian benon ripozi sur ni ĉiuj.  
Amen

## DISERVO DE LA PREĜOSEMAJNO POR LA UNUECO DE KRISTANOJ

G: Gvidanto

L (1,2): Leganto (j)

Ĉ: Ĉiuj

### Enkonduko

Kanto: ADORU 357, 1-3

G: En la nomo de la Patro, de la Filo kaj la Sankta Spirito.

Ĉ: Amen

G: La graco de la Sinjoro Jesuo Kristo, la amo de Dio kaj la kuneco kun la Sankta Spirito estu ĉiam kun vi.

Ĉ: Kaj ankaŭ kun vi.

L1: Gefratoj en Kristo, ĉijare la temo de la Preĝosemajno por la Unueco de la kristanoj, elektita de la Fratinoj de la komunumo de Grandchamp ĉe Svisio, estas: „*Restadu en nia amo kaj vi donos multe da frukto*”.

L2: Tiu estas la granda deziro de Dio, kiun Jesuo esprimis: Al li veni kaj en li restadi. Dio nelace atendas nin, en la espero ke ni, al Li unigitaj per la amo, donos fruktojn kiuj alportos vivon al ĉiuj. Antaŭ la diferenco de la „alulo”, ni riskas fermigi en ni mem kaj vidi nur tion kio disigas nin. Tamen ni aŭdu kiel Kristo vokas nin restadi en Lia amo kaj tiel produkti multe da frukto.

L1: Dum la tri sekvantaj preĝomomentoj, ni memoru la alvokon de Kristo kaj turnigu al Lia amo, al Li kiu estas la centro de nia vivo. La vojo de la unueco komencas per nia ena rilato al Dio. Restantaj ĉe Lia amo ni fortikigas la deziron serĉi la unuecon kaj repaciĝi al la aliaj. Dio malfermigis nin al tiuj al ni diferencaj. Tiu ĉi estas grava frukto, saniga donaco al la disigoj en ni, inter ni kaj en la mondo.

G: Pace ni preĝu al la Sinjoro: Sinjoro, Vi estas la vinberkultivisto, kiu ame prizorgas nin. Vi vokas nin vidi la belecon de ĉiu branĉo unuigita al la vinbero, la beleco de ĉiu homo. Eĉ tiel, tre ofte la diferencoj de la aliuoj ekstimigas nin. Ni fermigas en ni mem. Nia fido je Vi estas forlasita. Malamikecoj elvolvigas en ni. Veni kaj konduku denove niajn korojn al vi. Donu al ni la gracon vivi ekde Via pardono, por ke ni povu kunestadi kaj laŭdi Vian nomon.

### Litania de Laŭdoj

Ĉ: Vi, kiu vokas nin esti laŭdo meze de la mondo: gloro al Vi!

(Aŭ: Laŭdo kaj gloro al Vi, Sinjoro, Dio de la Univerŝo)

L1: Ni kantas Vian laŭdon meze de la mondo kaj de ĉiuj popoloj.

L2: Ni kantas vian laŭdon meze de la kreado kaj inter ĉiuj kreitaĵoj.

Ĉ: Vi, kiu vokas nin esti laŭdo meze de la mondo: gloro al Vi!

(Aŭ: Laŭdo kaj gloro al Vi, Sinjoro, Dio de la Univerŝo)

L1: Ni kantas Vian laŭdon meze de sufero kaj larmoj.

L2: Ni kantas Vian laŭdon inter promesoj kaj kokeroj.

Ĉ: Vi, kiu vokas nin esti laŭdo meze de la mondo: gloro al Vi!

(Aŭ: Laŭdo kaj gloro al Vi, Sinjoro, Dio de la Univerŝo)

L1: Ni kantas Vian laŭdon en lokoj de konflikto kaj nekompreno.

L2: Ni kanta Vian laŭdon en lokoj de renkonto kaj repaciĝo.

Ĉ: Vi, kiu vokas nin esti laŭdo meze de la mondo: gloro al Vi!

(Aŭ: Laŭdo kaj gloro al Vi, Sinjoro, Dio de la Univerŝo)

**L1:** Ni kantas Vian laŭdon meze de malkonkordoj kaj disigoj

**L2:** Ni kantas Vian laŭdon meze de la vivo kaj de la morto, en la naskiĝo de nova ĉielo kaj nova tero.

**Ĉ:** Vi, kiu vokas nin esti laŭdo meze de la mondo: gloro al Vi!  
(Aŭ: Laŭdo kaj gloro al Vi, Sinjoro, Dio de la Univerŝo)

*Unua preĝomomento: Restantaj en Kristo - La unueco de tuta la persono*

**Psalmo:** 103

Benu, ho mia animo, la Eternulon,  
Kaj mia tuta internaĵo Lian sanktan nomon.  
Benu, ho mia animo, la Eternulon,  
Kaj ne forgesu ĉiujn Liajn bonfarojn. –  
Li pardonas ĉiujn viajn pekojn,  
Li sanigas ĉiujn viajn malsanojn,  
Li savas de la tombo vian vivon,  
Li kronas vin per boneco kaj favorkoreco;  
Li satigas per bonaĵoj vian maljunan aĝon,  
Ke via juneco renoviĝas kiel ĉe aglo. –

La Eternulo faras justecon  
Kaj juĝon al ĉiuj prematoj.  
Li sciigis Siajn vojojn al Moseo,  
Siajn farojn al la Izraelidoj.  
Favorkora kaj kompatema estas la Eternulo,  
Longetolerna kaj tre bona.  
Ne eterne Li indignas,  
Kaj ne por ĉiam Li koleras.  
Ne laŭ niaj pekoj Li agis kun ni,  
Kaj ne laŭ niaj krimoj Li redonis al ni.  
Ĉar kiel alte estas la ĉielo super la tero,  
Tiel granda estas Lia boneco por tiuj, kiuj Lin timas.  
Kiel malproksime estas la oriento de la okcidento,  
Tiel Li malproksimiĝis de ni niajn pekojn.  
Kiel patro korfavoras filojn,  
Tiel la Eternulo korfavoras tiujn, kiuj Lin timas. –  
Ĉar Li scias nian esencon,  
Li memoras, ke ni estas polvo.  
La tagoj de homo estas kiel herbo,  
Kiel floro de kampo, tiel li floras.  
Pasas super ĝi vento, kaj ĝi jam ne ekzistas;  
Kaj ĝia loko ĝin jam ne rekonas.  
Sed la boneco de la Eternulo daŭras eterne al tiuj, kiuj Lin timas,  
Kaj Lia bonfaremeco iras ĝis la pranepoj,  
Kiuj observas Lian interligon  
Kaj memoras Liajn ordonojn por ilin plenumi.  
La Eternulo starigis en la ĉielo Sian tronon,  
Kaj Lia reĝeco regas ĉion. –

troviĝas trans suferado: Feliĉaj estas, kiujn la Spirito tuŝis, tial, ke ili ne plu retenas siajn larmojn, sed kiuj lasas flui siajn larmojn kaj tial konsoliĝas. Ili malkovras la fonton, kiu kaŝiĝas ene de si. Tial en ili kreskas malsato al justeco kaj soifo al komuna engaĝiĝo por mondo de paco.

Ĉiam ni estas vokitaj renovigi nian engaĝiĝon por la vivo per nia pensado kaj agado. Fojfoje ni jam ĉi tie travivas antaŭguston de la beno, kiu estos perfekta je la fino de la tempoj.

*„Preĝu kaj laboru, ke Lia regno venu.*

*La vorto de Dio vivigu en via tago*

*laboron kaj ripozon.*

*En ĉio konservu la internan silenton*

*por resti en Kristo.*

*La spirito de la feliĉigoj trapenetru vin:*

*Ĝojo, simpleco, kompatemo”*

*(La fratuloj de Grandchamp ĉiutage preĝas)*

**Preĝo**

Glorata vi estu, Dio nia patro,  
por la donaco de via vorto en la Sankta Skribo  
Glorata vi estu pro ties ŝanĝanta forto.  
Helpu al ni elekti la vivon, kaj gvidu nin per via Sankta Spirito  
por ke ni travivu la feliĉon, al kiu vi tiel volonte volas nin partoprenigi.  
Amen

**TAGO SESA**

*Akcepti la aliajn*

*Por ke vi iru kaj donu frukton; kaj ke via frukto daŭru (Joh 15, 16b)*

*Kantoj: komenco/fino: ADORU 429, 1-2//3-5*

*Gen 18, 1-5 Abrahamo akceptas la anĝelojn en la arbareto Manre*

Kaj aperis al li la Eternulo en la arbareto Manre, kiam li sidis ĉe la pordo de la tendo dum la varmeĝo de la tago. Kiam li levis siajn okulojn, li vidis, ke jen tri viroj staras antaŭ li. Ekvidinte, li kuris al ili renkonte de la pordo de la tendo kaj kliniĝis antaŭ ili ĝis la tero. Kaj li diris: Mia sinjoro! Se mi trovis plaĉon en viaj okuloj, ne pasu preter vian sklavon. Oni alportos iom da akvo, kaj vi lavu viajn piedojn kaj ripozu sub la arbo. Kaj mi alportos pecon da pano, por ke vi fortiĝu viajn korojn; poste vi foriros, ĉar por tio vi pasis preter via sklavo. Kaj ili diris: Faru tiel, kiel vi diris.

*Mar 6,30-44 La kortuŝiĝo de Jesuo pri la homamaso*

Kaj la apostoloj kolektiĝis al Jesuo, kaj rakontis al li ĉion, kion ili faris kaj instruis. Kaj li diris al ili: Venu mem aparte en dezertan lokon, kaj iom ripozu. Ĉar estis multaj verantaj kaj irantaj, kaj ili ne havis oportunon eĉ por manĝi. Kaj ili foriris en la ŝipeto al dezerta loko aparte. Kaj oni vidis ilin forirantajn, kaj multaj rekonis ilin, kaj piede oni kuris tien el ĉiuj urboj kaj antaŭveris ilin. Kaj li elvenis, kaj vidis grandan homamason, kaj li kortuŝiĝis pri ili, ĉar ili estis kiel ŝafoj ne havantaj paŝtiston; kaj li komencis instrui al ili multon. Kaj kiam la horo jam estis malfrua, liaj disĉiploj venis al li, kaj diris: La loko estas dezerta, kaj la horo estas jam malfrua; forsendu ilin, por ke ili iru en la

**TAGO KVINA**  
**Preta al ŝanĝiĝo per la vorto**  
**Jam vi estas puraj pro la vorto (Joh 15,3)**

*Kantoj: ADORU komenco 439, 1+2, fino 590*

*Rea 30,11-20 La vorto estas tute proksima al vi*

Ĉar ĉi tiu ordono, kiu mi donas al vi hodiaŭ, ne estas neatingebla por vi, kaj ĝi ne estas malproksima. Ne en la ĉielo ĝi estas, por ke oni povu diri: Kiu suprenirus por mi en la ĉielon kaj prenu ĝin por mi kaj aŭdigas ĝin al mi, por ke mi ĝin plenumu? Kaj ne trans la maro ĝi estas, por ke oni povu diri: Kiu iras por mi trans la maron kaj prenu ĝin por mi kaj aŭdigas ĝin al mi, por ke mi ĝin plenumu? Sed tre proksime de vi estas la afero: en via buŝo kaj en via koro, por plenumi ĝin.

Rigardu, mi proponis al vi hodiaŭ la vivon kaj bonon, kaj la morton kaj malbonon; ordonante al vi ami la Eternulon, vian Dion, iri laŭ Liaj vojoj, kaj observi Liajn ordonojn kaj Liajn leĝojn kaj Liajn decidojn, por ke vi vivu kaj multiĝu, kaj por ke vin benu la Eternulo, via Dio, en la lando, en kiu vi venas, por ekposedi ĝin. Sed se dekliniĝos via koro kaj vi ne aŭskultos kaj vi lasos forlogi vin kaj vi adokliniĝos al aliaj dioj kaj servos al ili: en tia okazo mi sciigas al vi hodiaŭ, ke vi pereos, ke vi ne longe vivos sur la tero, sur kiu vi transiras trans Jordanon, por veni tien kaj ekposedi ĝin. Mi atestigas pri vi hodiaŭ la ĉielon kaj la teron: la vivon kaj la morton mi proponis al vi, la benon kaj la malbonon; elekti la vivon, por ke vi vivu, vi kaj via idaro, amante la Eternulon, vian Dion, aŭskultante Lian voĉon kaj aliroĉante vin al Li; ĉar Li estas via vivo kaj via longatempoco de loĝado sur la tero, pri kiu la Eternulo juris al viaj patroj, al Abraham, al Isaak, kaj al Jakob, ke Li donos al ili.

*Mat 5, 1-12 Feliĉaj estas vi*

Kaj vidinte la homamasojn, li supreniris sur la monton, kaj kiam li sidigis, liaj disĉiploj venis al li, kaj malferminte la buŝon, li instruis ilin, dirante:

Feliĉaj estas la malriĉaj en spirito, ĉar ilia estas la regno de la ĉielo.

Feliĉaj estas la plorantaj, ĉar ili konsoliĝos.

Feliĉaj estas la humilaj, ĉar ili heredos la teron.

Feliĉaj estas tiuj, kiuj malsatas kaj soifas justecon, ĉar ili satiĝos.

Feliĉaj estas la kompatemaj, ĉar ili ricevos kompaton.

Feliĉaj estas la kore puraj, ĉar ili vidos Dion.

Feliĉaj estas la pacigantoj, ĉar filoj de Dio ili estos nomataj.

Feliĉaj estas tiuj, kiuj estas persekutitaj pro justeco, ĉar ilia estas la regno de la ĉielo.

Feliĉaj estas vi, kiam oni vin riproĉos kaj persekutos kaj false vin kalumnios pro mi. Ĝoju kaj raviĝu, ĉar via rekompenco estos granda en la ĉielo; ĉar tiel oni persekutus la profetojn, kiuj estis antaŭ vi.

#### **Medito**

La vorto de Dio estas tute proksima al mi. Ĝi signifas benon kaj promeson de feliĉo. Se mi malfermas miajn korojn, Dio parolas al mi kaj li ŝanĝas pacience ĉion en mi, kio estas formortinta. Li forigas tion, kio malhelpas la kreskadon de vera vivo, same kiel vinberisto tranĉas viton.

Kiam ni solaj aŭ grupe meditadas biblian tekston, tiam ŝanĝiĝas nia perspektivo. Multaj kristanoj ĉiutage preĝas la beatocojn. Tiuj revelacias al ni feliĉon, kiu estas kaŝta en neplemumblo, feliĉo

Bern la Eternulon Liaj anĝeloj, potencaj per sia forto,  
Kiu plenumas Lian vorton,  
Por ke oni obeu la voĉon de Lia vorto.  
Bern la Eternulon ĉiuj Liaj ĉirkaŭantoj,  
Liaj servantoj, kiuj plenumas Lian volon.  
Bern la Eternulon ĉiuj Liaj kreitaĵoj,  
En ĉiuj lokoj de Lia regado.  
Bern, ho mia animo, la Eternulon.

**Legajo:** Joh 15,1-17

Mi estas la vera vinberarbo,  
kaj mia Patro estas la kultivisto.  
Ĉiun nefruktodonan branĉon en mi Li forprenas;  
kaj ĉiun fruktodonan branĉon Li purigas,  
por ke ĝi donu pli da frukto.  
Jam vi estas puraj pro la vorto, kiu mi parolis al vi.  
Restadu en mi, kaj mi en vi.  
Kiel la branĉo ne povas de si mem doni frukton,  
se ĝi ne restas en la vinberarbo,  
tiel ankaŭ vi ne povas, se vi ne restas en mi.  
Mi estas la vinberarbo;  
vi estas la branĉoj; kiu restadas en mi, kaj mi en li,  
tiu donas multe da frukto;  
ĉar sen mi vi nenion povas fari.  
Se iu ne restas en mi, tiu estas elĵetita,  
kiel la branĉo, kaj sekigis;  
kaj oni ilin kolektas kaj jetas en fajron, kaj ili brulas.  
Se vi restadas en mi, kaj miaj vortoj restadas en vi,  
petu kion ajn vi volos, kaj tio estos farita por vi.  
En tio mia Patro estas glorata,  
ke vi donas multe da frukto;  
kaj vi estos miaj disĉiploj.  
Kiel la Patro min amis, tiel mi ankaŭ vin amis;  
restadu en mia amo.  
Se vi observos miajn ordonojn,  
vi restados en mia amo tiel same,  
kiel mi observis la ordonojn de mia Patro kaj restadas en Lia amo.  
Tion mi parolis al vi, por ke mia ĝojo en vi restadu, kaj via ĝojo estu plena.  
Jen estas mia ordono:  
ke vi amu unu alian tiel same, kiel mi vin amis.  
Neniu havas amon pli grandan ol tio,  
ke iu demetus sian vivon por siaj amikoj.  
Vi estas miaj amikoj, se vi faras tion, kion mi al vi ordonas.  
Mi jam ne nomas vin sklavoj, ĉar la sklavo ne scias,  
kion lia sinjoro faras; sed mi nomis vin amikoj, ĉar ĉion,  
kion mi aŭdis de mia Patro, mi sciigas al vi.  
Vi ne elektis min, sed mi elektis vin, kaj starigis vin,  
por ke vi iru kaj donu frukton, kaj ke via frukto daŭru;  
por ke la Patro donu al vi ĉion ajn, kion vi petos de Li en mia nomo.  
Tion mi ordonas al vi, por ke vi amu unu la alian.

**Kanto:** ADORU 361

*Silenta momento*

**Propetoj:**

**L1:** Dio de amo, pere de Kristo Vi diris al ni: „Vi ne elektis min, sed mi elektis vin”. Vi serĉas nin, Vi invitas nin ricevi Vian amikecon kaj restadi en Vi. Instru nin respondi pli profunde tiun inviton kaj kreski laŭ vivo ĉiam pli plena.

Ĉ: La ĝojo de nia koro estas en Dio.

**L2:** Dio de la vivo, Vi vokas nin esti laŭdo meze de la mondo kaj reciproke ricevi nin kiel donaco de via graco. Ke via amema rigardo, kiu ripozas sur ĉiu persono, malfermu niajn korojn por reciproke ricevi nin ĝuste kiel ni estas.

Ĉ: La ĝojo de nia koro estas en Dio

**L1:** Dio de la unueco, Vi lokas nin unuataj kiel vinberĝardeno en Via Filo Jesuo. Ke Via amema Spirito restu en ni, en paroĝaj renkontoj kaj ekumenaj kunvenoj lokaj. Faru ke ni kune povu Vin ĝoje celebri.

Ĉ: La ĝojo de nia koro estas en Dio

**L2:** Dio de la ununura vinberĝardeno, Vi vokas nin restadi en Via amo en ĉio kion ni faras kaj diras. Tuŝite de Via boneco, favorodonu al ni esti reflektito de tiu amo ĉe niaj homoj kaj laborejoj. Ke ni povu povini la vojon por konstrui pontojn sur la rivalecoj kaj superi streĉojn.

Ĉ: La ĝojo de nia koro estas en Dio.

**Ago**

**G:** Multfoje ni pensas pri preĝoj kiel io kion ni faras, aktiveco nia. Dum tiu ĉi mallonga spaco da tempo, ni estas invitataj al interna silento kaj malproksimiĝi de tuta bruo, zorgegoj kaj pensoj. Dum tiu ĉi silento, la ago apartenas al Dio. Ni estas simple vokataj restadi en Dia amo, ripozi en Li.

*Silenta momento*

**Kanto:** ADORU 439

*Dua preĝomomento: La videbla unueco de la kristanoj*

**Psalmo:** 85

Vi kofavoris, ho Eternulo, Vian landon,

Vi revenigis la forkaptitojn de Jakob,

Vi pardonis la kulpon de Via popolo,

Vi kovris ĉiujn ĝiajn pekojn.

Vi retenis Vian tutan koleron,

Forlasis Vian furiozon.

Tumu Vin al ni, ho Dio de nia savo,

Kaj ĉesigu Vian koleron kontraŭ ni.

Ĉu eterne Vi nin koleros,

Daŭrigos Vian koleron de generacio al generacio?

Ĉu Vi ne revivigos nin denove,

**TAGO KVARA**

*Ni petu komune*

*Mi jam ne nomas vin sklavoj...sed mi nomis vin amikoj (Joh 15,15)*

*Kantoj: komenco/fino: ADORU 346,1-3//4-7*

*Rom 8,26 Kaj tiel same la Spirito ankaŭ helpas nian malfortecon*

Kaj tiel same la Spirito ankaŭ helpas nian malfortecon; ĉar ni ne scias, kiel preĝi dece, sed la Spirito mem propetas por ni per ĝemoj neeldireblaj.

*Luk 11,1 Sinjoro, instru nin preĝi*

Kaj li preĝis en iu loko; kaj kiam li ĉesis preĝi, unu el liaj disĉiploj diris al li: Sinjoro, instru nin preĝi, kiel ankaŭ Johano instruis siajn disĉiplojn.

**Medito**

Dio deziras kontakti nin. Li serĉas nin, tiel, kiel li serĉis Adamon, kiam Li kriis post Adamo: „Kie vi estas?” (Gen 3,9)

Dio renkontas nin en Kristo. La vivo de Jesuo estis preĝo. Li estis en la preĝo intime kune kun Sia Patro kaj interamikiĝis kun siaj disĉiploj kaj kun ĉiuj, kiujn Li renkontis. Li permesis al ili havi tion, kio estis al Li la plej valora: esti en amplena interrilato kun lia Patro, kiu estas ankaŭ nia Patro. Jesuo kaj liaj disĉiploj sekvis iliajn riĉajn judan tradicion kaj kantis komune la psalmojn. Sed kelkfoje Jesuo retiriĝis, ke Li preĝu sole.

Ni povas preĝi kune kun iuj aŭ sole. La preĝo povas esprimi admiron, peton, dankon aŭ simple nur silenton. Kelkfoje ni volonte petus, nur ni ne scias, kiel. Kiam ni turniĝas al Jesuo kaj ni petas Lin „Instru nin preĝi”, tio jam preparas la vojon. Jam la „volo por preĝado” estas preĝo.

Kurveni kun iu grupo povas esti granda helpo. La komunumo kreskas tra kantoj, vortoj kaj silentoj. Kiam ni komune preĝas kun kristanoj de aliaj tradicioj, ni travivas tiun ĉi neatendindan sperton, ke ni unuigas tra neapartigebla amikeco, por kio ni estas dankemaj por la ununura Dio. La formoj povas esti diversaj, sed la Spirito estas unu, kiu kondukas nin unu al alia.

*„En la ofteco de komunaj preĝoj ĝermadas la amo de Jesuo en ni, nesciante, kiel. La komuna preĝo ne absolvas nin de la persona preĝo. Unu portas la alian. Ni kapti ĉiutage la momenton, kiam ni novigas nian intiman interligon kun Jesuo Kristo.”*

Frère Roger, La fonto de Taizé, Taizé 1980, S. 20

**Preĝo**

Sinjoro Jesuo, via tuta

tuta vivo estis preĝo, en unueco kun via Patro.

Per la Spirito instru nin, je via volo, preĝi

Unuigu en la tuta mondo la kredantojn en petoj kaj laŭdo,

kaj venu la regno de via amo.

Amen

surmetis siajn vestojn kaj denove sidigis, li diris al ili: Ĉu vi scias, kion mi faris al vi? Vi nomas min Majstro kaj Sinjoro, kaj prave vi diras, ĉar tia mi estas. Se do mi, la Sinjoro kaj la Majstro, lavis viajn piedojn, vi ankaŭ devas inter vi lavi la piedojn. Ĉar mi donis al vi ekzemplon, por ke vi ankaŭ faru tion, kion mi faris al vi.

Novan ordonon mi donas al vi, ke vi amu unu alian; kiel mi amis vin, tiel vi ankaŭ amu unu alian. Per tio ĉiuj homoj scios, ke vi estas miaj disĉiploj, se vi havos amon unu al alia.

### **Medito**

La vesperon antaŭ la morto Jesuo antaŭ disĉiploj siaj klinigis por piedlavo. Li ja konsis la malfacilaĵojn de komuna vivo kaj la rolegon de pardonadpreteco kaj reciproka servado. „Se mi ne lavas vin“, li diris al Petro, „vi ne plu havos parton de mi.“

Petro ja akceptis la geston de Jesuo laviĝante kaj tuŝigante de la humileco kaj la mildeco de Kristo. Pli malfrue li imitis la ekzemplon de Jesuo servante la komunumon de la fideluloj en la praaj Eklezioj.

Volas Jesuo Kristo ke vivo kaj amo trafu nin kiel kreskanta suko tra vinberarbedo, por ke la kristanaj komunumoj formu unu korpon. Kaj hodiaŭ kaj pasinteco, kurvivo ne ĉiam facilas! Ofte ni klare vidas niajn proprajn limojn. Ne ĉiam ni sukcesas ŝati tiujn kiuj proksimas al ni socie, kolektive, familie. De tempo al tempo niaj rilatoj komplete rompiĝas.

En Kristo ni estas invitataj surmeti kompatemon kaj ĉiam denove aŭdaci novan komencon. La certeco esti amataj de Dio movas nin, ke unu bonveragu la alian kun ĉiaj fortoj kaj malfortoj. Tiam Kristo troviĝas en nia mezo.

*„Per kvazaŭ nenio vi kreas repaciĝon en la mistero de komunumo, do en la Eklezio. La malsola engaĝiĝo spronas vin - ĝoju ĉar vi ne plu estas sola fronte en ĉio la vojoj de viaj fratroj. Kune kun ili vi estas vokita realigi parabolon de solidareco.“*

Frère Roger, Liebe aller Liebe. Die Quellen von Taizé, Freiburg/Basel/Wien 1990, p. 61-62

### **Preĝo**

Dio, patro nia,  
vi malkaŝas al ni vian amon kaj per Kristo  
kaj per niaj gefratoj.  
Malfermu niajn korojn  
ke ni akceptu la diversecon de ĉiuj reciproke  
kaj pretu ĉiam pardonu.  
Permesu doni al ni vivon unuigintan en unu korpo de unueco  
por povi ekkoni  
ke ĉe ĉiuj temas pri unusopula donaco.  
Lasu nin fariĝi bildo de la viva Kristo.  
Amen

Ke Via popolo ĝoju per Vi?  
Aperigu al ni, ho Eternulo, Vian favoron,  
Kaj Vian helpon donu al ni. –

Mi aŭda, kion diras Dio, la Eternulo;  
Ĉar Li deklaras pacon al Sia popolo kaj al Siaj fideluloj.  
Ke ili ne reiru al malsaĝeco.  
Jam proksima estas Lia helpo al tiuj, kiuj Lin timas,  
Por ke ekregu honoro en nia lando.  
Bono kaj vero renkontiĝas,  
Justeco kaj paco sin kisas.  
Vero elkreskas el la tero,  
Kaj justeco rigardas el la ĉielo.  
Kaj la Eternulo donos bonon,  
Kaj nia tero donos siajn produktojn.  
Justeco iros antaŭ Li  
Kaj faros vojon por Liaj paŝoj

**Legajo:** 1 Kor 1,10-13

Mi petegas vin, fratroj, per la nomo de nia Sinjoro Jesuo Kristo, ke vi ĉiuj parolu tion aman, kaj ke estu neniaj skismoj inter vi; sed ke vi estu perfekte kunigitaj en la sama spirito kaj en la sama juĝo. Ĉar pri vi, miaj fratroj, estas sciigite al mi de la donanoj de Hloce, ke ekzistas inter vi malpacoj. Kaj la jenon mi volas diri, ke ĉiu el vi diras: Mi estas de Paŭlo; kaj mi de Apolos; kaj mi de Kefas; kaj mi de Kristo. Ĉu Kristo estas dividita? ĉu Paŭlo krucumigis por vi? aŭ ĉu vi baptiĝis en la nomon de Paŭlo?

**Kanto:** ADORU 429

*Santa momento*

### **Propetoj:**

**L1:** Sankta Spirito, Vi kreas kaj rekreas la Eklezion ĉie. Venu kaj flustru en niaj koroj la preĝon kiun Jesuo direktis al Sia Patro vespere antaŭ Sia pasio: „ke ili ĉiuj estu unu...por ke la mondo kreu“.

Ĉ: Kyrie eleison (Sinjoro, kompatu nin)

**L2:** Sinjoro Jesuo, Princo de la Paco, flamiĝu la fajron de Via amo en ni, por ke suspektoj, malpaco kaj malkonkordo trovos finon en la Eklezio. Falu la muroj kiuj disigas nin.

Ĉ: Kyrie eleison (Sinjoro, kompatu nin)

**L1:** Sankta Spirito, Konsolanto de ĉiuj, malfermu niajn korojn al la pardono kaj repaciĝo kaj rekonduku nin de niaj misdevoj.

Ĉ: Kyrie eleison (Sinjoro, kompatu nin)

**L2:** Sinjoro Jesuo, milda kaj korhamala, donu al ni spiritan malriĉecon por ke ni povu ricevi Vian neatenditan gracon.

Ĉ: Kyrie eleison (Sinjoro, kompatu nin)

**L1:** Sankta Spirito, neniĝu forlasu la virojn, virinojn kaj infanojn persekutitajn pro sia fideleco al la Evangelio. Donu al ili forton kaj kuraĝon kaj apogu tiujn kiuj ilin helpas.

Ĉ: Kyrie eleison (Sinjoro, kompatu nin)

**Ago:** Divido de la pasigno (konforme al la pandemiaj reguloj)

**G:** La Sinjoro vokas nin esti unuigitaj inter ni. Li donas al ni Sian pacon kaj invitas nin partigi ĝin. Ni ŝanĝu signon de tiu paco kun niaj najbaroj. Ĉiu persono turniĝu al la plej proksimumo kaj oferedu signon de paco, laŭ la loka kunteksto.

**Kanto:** ADORU 590

*Tria preĝomomento: La unueco de ĉiuj popoloj kaj tuta kreado*

**Psalmo:** 96

Kantu al la Eternulo novan kanton;  
Kantu al la Eternulo la tuta tero.  
Kantu al la Eternulo, glori Lian nomon,  
Proklamu de tago al tago Lian savon.  
Rakontu inter la popoloj Lian gloron,  
Inter ĉiuj gentoj Liajn miraklojn. –

Ĉar la Eternulo estas granda kaj tre glorinda,  
Li estas timinda pli ol ĉiuj dioj.  
Ĉar ĉiuj dioj de la popoloj estas nur idoloj;  
Sed la Eternulo kredis la ĉielon.  
Gloro kaj majesto estas antaŭ Li,  
Forto kaj beleco estas en Lia sanktejo. –

Tributu al la Eternulo, familioj de la popoloj;  
Tributu al la Eternulo gloron kaj potencon.  
Tributu al la Eternulo la honoron de Lia nomo;  
Alportu donacon kaj venu en Liajn kortojn.  
Kliniĝu al la Eternulo en sankta ornamo;  
Tremu antaŭ Li la tuta tero. –

Diru inter la popoloj:  
La Eternulo reĝas,  
Kaj fortikigita estas la mondo, ke ĝi ne ŝanceliĝu;  
Li juĝas la popolojn en justeco.  
Ĝoju la ĉielo, kaj estu gaja la tero,  
Bruu la maro, kaj ĉio, kio ĝin plenigas.  
Ĝoju la kampo, kaj ĉio, kio estas sur ĝi;  
Tiam kanu ĉiuj arboj de la arbaro  
Antaŭ la Eternulo, ĉar Li venas,  
Ĉar Li venas, por juĝi la teron;  
Li juĝos la mondon kun justeco  
Kaj la popolojn kun Sia fideleco.

**Legajo:** Apo 7, 9-12

Post tio mi rigardis, kaj jen granda homamaso, kiun neniu povis kalkuli, el ĉiu nacio, kaj el ĉiuj triboj kaj popoloj kaj lingvoj, starantaj antaŭ la trono kaj antaŭ la Ŝafido, vestitaj per blankaj roboj, kaj kun palmoj en iliaj manoj, kaj ili kriis per granda voĉo, dirante: Savo al nia Dio, la sidanta sur la trono, kaj al la Ŝafido. Kaj ĉiuj anĝeloj staris ĉirkaŭ la trono kaj la presbiteroj kaj la kvar kreataĵoj; kaj ili

Ni ankaŭ bezonas longan periodon de maturiĝo, unu tutan vivon, por kapabli droni en la profundecon de la amo de Kristo, por lasi, ke Li restadu en ni kaj ni en Li. Nesciante kiel, la Spirito loĝigas Kriston en nia koro. Kaj estas per la preĝo, aŭskultante la Parolon, kundividante ĝin kun la aliaj, praktikante tion, kion ni komprenas, ke nia interno estas fortikigita.

*„Lasante Kriston malsupreniri al la profundejoj de nia estaĵo... Li eniros en la regionojn de la menso kaj de la koro; Li atingos nian karnon ĝis nian plian profundan estaĵon, por ke ni ankaŭ spertu iam la profundecon de la mizerikordo“.* (La fontoj de Taizé (2000, p. 134)

**Preĝo**

Sankta Spirito,  
Ke ni povu ricevi en niajn korojn la ĉeeston de Kristo,  
kaj tion valorigi kiel sekretojn de amo.  
Nuru nian preĝon,  
Lumiĝu nian legadon de la Skribo,  
Agu per ni,  
Por ke la fruktoj de viaj donacoj povu pacience kreski ĉe ni.  
Amen

**TAGO TRIA**

*Esti unu korpo*

*Ke vi amu unu alian tiel same, kiel mi vin amis (Joh 15,12b)*

*Kantoj: komenco/fino: ADORU 276, 1-3/4-7*

*Kol 3,12-17 Surmetu do koron de kompato*

Surmetu do, kiel elektitoj de Dio, sanktaj kaj amataj, koron de kompato, bonkorecon, humilecon, mildecon, toleremecon; reciproke paciencante kaj pardonante, se iu havas plendon kontraŭ iu, kiel la Sinjoro pardonis vin, tiel vi ankaŭ faru; kaj super ĉion tion surmetu amon, kiu estas ligilo de perfekteco. Kaj la paco de Kristo prezidu en viaj koroj, al kiu ankaŭ vi estas vokitaj en unu korpo, kaj estu dankemaj. La vorto de Kristo loĝu en vi riĉe, en ĉia saĝeco; kaj instruas kaj admonu unu la alian per psalmoj kaj himnoj kaj spiritaj kantoj, kantante kun graco en viaj koroj al Dio. Kaj kion ajn vi faras per vorto aŭ ago, faru ĉion en la nomo de la Sinjoro Jesuo, dankante Dion, la Patron, per li.

*Joh 13,1-15.34-35 Unu amu la alian*

Kaj antaŭ la Paska festo Jesuo, sciante, ke lia horo venis, por ke li transiru el ĉi tiu mondo al la Patro, aminte siajn proprulojn, kiuj estis en la mondo, amis ilin ĝis la fino. Kaj dum la vespermanĝo, kiam la diablo jam metis en la koron de Judas Iskariota, filo de Simon, la intencon perfidi lin, Jesuo, sciante, ke la Patro donis ĉion en liajn manojn, kaj ke li venis de Dio kaj iras al Dio, leviĝis de la vespermanĝo kaj demetis siajn vestojn; kaj li prenis viŝtukon, kaj sin zonis. Poste li verŝis akvon en la pelvon, kaj komencis lavi la piedojn de la disĉiploj kaj viŝi ilin per la tuko, per kiu li estis zonita. Tiam li venis al Simon Petro. Ĉi tiu diris al li: Sinjoro, ĉu vi lavas al mi la piedojn? Jesuo respondis kaj diris al li: Kion mi faras, vi nun ne scias, sed poste vi komprenos. Petro diris al li: Vi ja neniam lavos miajn piedojn. Respondis al li Jesuo: Se mi ne lavas vin, vi ne partoprenas kun mi. Simon Petro diris al li: Sinjoro, ne nur miajn piedojn, sed ankaŭ la manojn kaj la kapon. Jesuo diris al li: Kiu sin jam banis, tiu bezonas nur, ke oni lavu la piedojn, kaj li estas tute pura; kaj vi estas puraj, tamen ne ĉiuj. Ĉar li konis tiun, kiu perfidos lin; tial li diris: Vi ne ĉiuj estas puraj. Kiam do li jam lavis iliajn piedojn kaj

## Preĝo

Jesuo Kristo, Vi serĉas nin, Vi volas proponi al ni Vian amikecon kaj konduki nin al ĉiam pli plena vivo.  
Donu al ni la konfidon por respondi Vian alvokon.  
Do, vi transformos tion, kio ĝenas nin,  
kaj ni fariĝos atestantoj de Via tenereco por nia mondo.  
Amen

## TAGO DUA Maturiĝante interne Restadu en mi, kaj mi en vi (Joh 15,4a)

*Kantoj: komenco/fino: ADORU 582, 1-4//5-7*

*Efe 3,14-21: Kristo loĝu per fido en viaj koroj*

Pro tio mi fleksas miajn genuojn antaŭ la Patro, el kiu ĉiu familio, en la ĉielo kaj sur la tero, estas nomata, por ke Li donu al vi, laŭ la riĉo de Sia gloro, ke vi estu potence fortigitaj en la interna homo, per Lia Spirito; por ke Kristo loĝu per fido en viaj koroj; tiel, ke vi, enradikigite kaj bazite en amo, kapablu kun ĉiuj sanktuloj kompreni, kio estas la larĝeco kaj longeco kaj alteco kaj profundeco, kaj scii la amon de Kristo, kiu superas scion, por ke vi pleniĝu eĉ ĝis la pleneco de Dio. Nun al Ti, kiu povas tre abunde fari, super ĉio, kion ni povas peti aŭ pensi, laŭ la potenco, kiu energias en ni, estu gloro en la eklezio kaj en Kristo Jesuo ĝis ĉiuj generacioj por ĉiam kaj eterne. Amen.

*Luk 2,41-52: Maria konservis ĉiujn tiujn dirojn en sia koro*

Kaj liaj gepatroj iris ĉiujare al Jerusalemo ĉe la Paska festo. Kaj kiam li estis dekdujara, ili surprizis laŭ la kutimo de la festo; kaj kiam ili jam pasigis la tagojn, ĉe ilia returniĝo la knabo Jesuo restis en Jerusalemo, kaj liaj gepatroj tion ne sciis; sed supozante, ke li estas en la karavano, ili iris tagan vojaĝon, kaj serĉis lin inter siaj parencoj kaj konatoj; kaj ne trovinte lin, ili reiris al Jerusalemo, serĉante lin. Kaj post tri tagoj ili trovis lin en la templo, kie li sidis meze de la instruistoj, aŭskultante ilin kaj metante al ili demandojn; kaj ĉiuj, kiuj aŭdis lin, miregis pro lia kompreno kaj liaj respondoj. Kaj ili miris, vidante lin, kaj lia patrino diris al li: Filo, kial vi tiel agis kontraŭ ni? jen via patro kaj mi serĉis vin kun malĝojo. Kaj li diris al ili: Kial vi serĉis min? ĉu vi ne sciis, ke mi devas esti en la domo de mia Patro? Kaj ili ne komprenis la diron, kiun li parolis al ili. Kaj li malsupreniris kun ili, kaj venis en Nazareton, kaj li estis obeema al ili; kaj lia patrino konservis ĉiujn tiujn dirojn en sia koro. Kaj Jesuo progresis en saĝeco kaj staturado, kaj en graco ĉe Dio kaj homoj.

## Medito

La renkonto kun Jesuo vekas la deziron resti ĉe Li kaj resti en Li: tempo por la frukta maturiĝo.

Estante tute homa kiel ni, Jesuo kreskis kaj maturiĝis. Li vivis simplan vivon enradikitan en la praktikoj de la juda fido. Dum lia kaŝita vivo en Nazaret, kie ŝajne nenio eksterordinara okazis, la ĉeesto de la Patro nutris Lin.

Maria kontempladis la agojn de Dio en sia vivo kaj en tiu de sia Filo. Ŝi valorigis ĉiujn tiujn aferojn en sia koro. Tiel, malrapide, ŝi ĉirkaŭbrakis la misteron de Jesuo.

falis sur sian vizaĝon antaŭ la trono, kaj adorkliniĝis al Dio, dirante: Amen; La laŭdo kaj la gloro kaj la saĝeco kaj la danko kaj la honoro kaj la potenco kaj la forto estu al nia Dio por ĉiam kaj eterne. Amen.

**Kanto:** ADORU 597

## Homilio

*Silenta momento*

## Propetoj:

**L1:** Dio de la vivo, Vi kreis ĉiun homon laux Via imago kaj simileco. Ni kantas Vian laŭdon pro la donaco de niaj multaj kulturoj, esprimoj de kredo, tradicioj kaj etnoj. Donu al ni kuragon kontraŭbatali la maljustecon kaj malamon bazitan sur raso, klaso, genro, religio kaj timo de tiuj kiuj ne estas kiel ni.

**Ĉ:** Dio de paco, Dio de amo, en Vi estas nia espero!

**L2:** Dio mizerikorda, Vi montris ke en Kristo ni estas unu kun Vi. Instrua nin uzi tiun donacon en la mondo, por ke la sekvantoj de ĉiuj religioj en ĉiuj landoj povu esti kapablaj aŭskulti unu la aliajn kaj vivi en paco.

**Ĉ:** Dio de paco, Dio de amo, en Vi estas nia espero!

**L1:** Ho Jesuo, Vi venis al la mondo kaj partigis plene nian homecon. Vi konas la durecojn de la vivo, kiuj atingas la homojn kiuj suferas per tiel multaj kaj malsamaj manieroj. Ke la Spirito de kompato instigu nin partigi nian tempon, nian vivon kaj niajn havaĵojn kun tiuj kiuj necesbezonas.

**Ĉ:** Dio de paco, Dio de amo, en Vi estas nia espero!

**L:** Sankta Spirito, Vi aŭdis la furiozon de nia vundita kreatoro kaj la kriado de la jam suferantoj pro la klimataj ŝanĝoj. Orientigu nin al novaj kondutoj. Ke ni povu lerni kiel vivi harmonie kiel parto de Via kreaĵaro.

**Ĉ:** Dio de paco, Dio de amo, en Vi estas nia espero!

**Ago:** inspirita sur teksto de Doroteus de Gaza

**L1:** Imagu cirkon desegritan sur la grundo. Imagu ke tiu cirklo estas la mondo. La indikitaj homoj levigas kaj ĉirkaŭas kandelon (ŝipe paska kandelo), kiu staras ĉe la centro.

**L2:** La centro prezentas Dion, kaj la vojoj al la centro estas pluraj vivmanieroj, kiujn havas la homoj. Kiam la homoj vivantaj en tiu ĉi mondo, volas alproksimiĝi al Dio, ili marŝas al la centro de la cirklo. La homoj elpaŝas ion rektan al la centro.

**L1:** Laŭmezure ili moviĝas al la centro, al Dio, ili alpromiĝas unuj al aliaj. Kaj laŭmezure ili alproksimiĝas unuj al aliaj... La homoj moviĝas kune al la centro...

**L2:** ili pli alproksimiĝas al Dio. Alvenante al la centro, la homoj lumigas siajn kandelojn. Kune, stare en la centro, ili restas ion silente.

*Silenta momento*

**G:** Per la vortoj, kiujn Jesuo instruis nin, ni preĝu kune.

**Ĉ:** Patro nia,

kiu estas en la ĉielo, sanktigata estu via nomo.

Venu via regno.

Fariĝu via volo kiel en la ĉielo, tiel ankaŭ sur la tero.

Nian panon ĉiutagan donu al ni hodiaŭ kaj pardonu al ni niajn ŝuldojn,

kiel ankaŭ ni pardonas al niaj ŝuldantoj.

Kaj ne konduku nin en tenton,

sed liberigu nin de la malbono. Amen

**Kanto:** ADORU 505

*Dum oni kantas, tiuj kiuj havigis stajn kandelojn returnas kaj partigas kun la aliaj partoprenantoj la lamon kiam ili ricevis.*

**G:** Spiriteco kaj solidareco estas nedisigeble unuigitaj. Preĝo kaj agado devas resti kune. Kiam ni restas en Kristo, ni ricevas la Spiriton de kuraĝo kaj saĝo por agadi kontraŭ tutan maljusticon kaj opreson. Ni diras kune:

**Ĉ:** Ni preĝu kaj laboru por ke Dio reĝu. Laflonge nia tago ni permesu ke la Vorto de Dio alportu vivon al nia laboro kaj al nia ripozo. Ni konservu enan silenton en ĉiuj aĵoj por ke ni povu loĝi en Kristo. Ni estu plenaj el la Spirito de la feliĉpromesoj: ĝojo, simpleco, makzerikordo. Tiuj vortoj estas ĉiutage reititaj de la fratinoj de la komunumo de Grandchamp.

**Beno:**

**G:** Vi estu unu, por ke la mondo kredu! Restu en la amo de Kristo! Iru al la mondo kaj prokultu la fruktojn de Lia amo.

**Ĉ:** Ke la Dio de espero plenigu nin per ĝojo kaj paco en la fido, por ke ni povu esti plenaj je espero per la povo de la Sankta Spirito. En la nomo de la Patro, kaj de la Filo kaj de la Sankta Spirito. Amen.

**Kanto:** ADORU 448

**TAGO UNUA**

**Vokitaj de Dio**

**„Vi ne elektis min, sed mi elektis vin“ (Joh 15,16)**

*Kantoj: komenco/fino: ADORU 561, 1+2//3+4*

*Gen 12,1-4 La voko de Abram*

Kaj la Eternulo diris al Abram: Iru el via lando, el inter via parencaro, kaj el la domo de via patro, al la lando, kiun Mi montros al vi. Kaj Mi faros vin granda popolo, kaj Mi benos vin kaj grandigos vian nomon, kaj vi estos beno. Kaj Mi benos viajn benantojn, kaj viajn malbenantojn Mi malbenos, kaj beniĝos per vi ĉiuj gentoj de la tero. Kaj Abram iris, kiel la Eternulo diris al li, kaj kun li iris Lot. Kaj Abram havis la aĝon de sepdek kvin jaroj, kiam li eliris el Haran.

*Joh 1,35-51 La voko de la unuaj disĉiploj*

Denove la sekvantan tagon staris Johano, kaj du el liaj disĉiploj; kaj rigardante Jesuon promenantan, li diris: Jen la Ŝafido de Dio! Kaj la du disĉiploj aŭdis lin paroli, kaj sekvis Jesuon. Kaj Jesuo sin turnis, kaj vidis ilin sekvantajn, kaj diris al ili: Kion vi serĉas? Kaj ili diris al li: Rabeno (tio estas, Majstro), kie vi loĝas? Li diris al ili: Venu, kaj vi vidos. Ili do venis, kaj vidis, kie li loĝas, kaj ili restis ĉe li tiun tagon; estis ĉirkaŭ la deka horo. Unu el la du, kiuj aŭdis Johanon kaj lin sekvis, estis Andreo, la frato de Simon Petro. Tiu unue trovis sian propran fraton Simon, kaj diris al li: Ni trovis la Mesion (tio estas, Kriston). Li kondukis lin al Jesuo. Jesuo lin rigardis, kaj diris: Vi estas Simon, filo de Jona; vi estos nomata Kefas (tio estas, Petro). La sekvantan tagon li volis foriri en Galileon, kaj trovis Filipon; kaj Jesuo diris al li: Sekvu min. Filipo estis el Betsaida, la urbo de Andreo kaj Petro. Filipo trovis Natanaelon, kaj diris al li: Ni trovis tiun, pri kiu skribis Moseo en la leĝo, kaj la profetoj, Jesuon el Nazaret, filon de Jozef. Kaj Natanael diris al li: Ĉu io bona povas esti el Nazaret? Filipo diris al li: Venu kaj vidu. Jesuo vidis Natanaelon venanta al li, kaj diris pri li: Jen vera Izraelido, en kiu ne estas ruzeco! Natanael diris al li: Per kio vi min konas? Jesuo respondis kaj diris al li: Antaŭ ol Filipo vin vokis, kiam vi estis sub la figarbo, mi vin vidis. Natanael respondis kaj diris al li: Rabeno, vi estas la Filo de Dio, vi estas Reĝo de Izrael! Jesuo respondis kaj diris al li: Ĉu vi kredas pro tio, ke mi diris al vi: Mi vin vidis sub la figarbo? vi vidos pli grandajn aferojn ol ĉi tio. Kaj li diris al li: Vere, vere, mi diras al vi, vi vidos la ĉielon malfermita kaj la anĝelojn de Dio suprenirantaj kaj malsuprenirantaj sur la Filon de homo.

**Medito**

Komence okazas renkontiĝo inter la homo kaj Dio, inter la kreito kaj la Kreinto, inter la tempo kaj la eterneco.

Abram aŭdas la vokon: „Iru el via lando... al la lando, kiun Mi montros al vi“. Same kiel li, ĉiu el ni estas vokita lasi tion, kio estas al li kara, por iri al la tero, kiun Dio en la Koro preparis por niaj koroj. Survoje, ni ĉiam pli fariĝas ni mem, kiel Dio volis nin de la komenco. Sekvante la alvokon adresitan al ni, ni fariĝas beno al ĉiuj proksimuloj kaj al la mondo.

Dio, en sia amo, serĉas nin. Li fariĝis homo en Jesuo, en kiu ni renkontas Lian rigardon. En nia vivo, kiel en la Evangelio de Johano, la voko de Dio estas aŭdata diversmaniere. Tuŝitaj de Lia amo, ni ekiris. En ĉi tiu renkonto ni spertas la vojon de transformado. Brila komenco de ama rilato, kiun ĉiam necesas renovigi.

*Iun tagon vi komprenis, ke sen via konsento „jes“ jam estis gravurita en la profundo de via estajo. Kaj vi elektis antaŭeniri sekvante Kriston. Silente en la ĉeesto de Kristo, vi ekkomprenis Lian vorton: „Venu kaj sekvu Min, Mi donos al vi, kie ripozas via koro“.*